HUNGARA VIVO

2
1982
13,– Ft

ĈIU
PECO
MARKO!
80 vendejoj ofertas
servo por klientoj:
184-697
NÉPMŰVÉSZETI·ÉS·HÁZIIPARI·VÁLLALAT·
Popolarta kaj Hejmindustria
Entrepreno
Hungaraj popolartaĵoj por memoro, por donaco

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate

XXIIa jaro, 1982 n-ro 2
(102)

*****

ENHAVO

Kroniko de dek tagoj 42
Szabó, L.: Sonĝo de Ĝuang Dzi
Kosztolányi, D.: Kiel iu, falinta sur la rel'
Babits, M.: Vespera demando (Tradukoj de K. *Kalocsay*) 49
László, I.: Departemento Vas – Regionoj de Hungario 50
Fejes, M.: Kiel oni loĝas, kiel oni akiras loĝejon en Hungario 52
Fejes, M.: Saluto al Mihály Gergely 55
D-ro *Rátkai,* Á.: 2. La pramovado – Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 56
László, I.: Meritplena esperantisteco 58
Mihalkov, G.: Tristo kaj amo al la homoj 59
Panoramo 60
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 63
D-ro *László,* F.: La protekto de la lago Balatono 64
Szabó, J.: Ekonomia regulsistemo kun ŝanĝo de strukturo 71
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 73
Mihalkov, G.: La rozoj 74
Auld, W.: Tradukisto de la „kvarminuta mejlo" 76
Krucenigmo 79
Leterkesto 79, 80
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 80
Korespondi deziras 80

*****

Sur la titolpago: Zoltán *Gera* (Vaskov) kaj Gabi *Jobba* (Rita) en „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj". (Foto de J.*Regös*)

Készült az ÉTK Nyomdaüzemében 820464

Teatra temo...

plenigas la unuajn sep paĝojn de tiu ĉi numero, detala raporto pri la Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, okazinta fine de marto en Budapeŝto. Malofte ni dediĉas tiom da spaco al unu temo, sed en tiu ĉi kazo la redaktora malavareco estas plene motivita: dum dek tagoj okazis dek du esperantlingvaj teatraj prezentadoj, kaj pluraj el ili estis inter la plej altnivelaj, kiujn oni povis vidi iam en Esperantujo. La tekstan raporton akompanas aro da fotoj, por doni imagon pri la unika aranĝo al niaj legantoj, kiuj ne povis ĉeesti ĝin. Ni esperas, ke tiu ĉi raporto stimulos multajn trovi tempon por veni al Budapeŝto fine de marto 1983.

Literaturaj kontribuaĵoj ne tre abundas nun, tamen denove aperas ĉerpaĵoj el „Hungara Antologio", kiu eliros post jaro en grandformata, 600-paĝa bindita volumo, kun 241 verkoj de 73 hungaraj aŭtoroj. Niaj hungaraj legantoj intertempe jam ricevis alvokon por antaŭmendo – espereble multaj jam eĉ pagis por certigi sian ekzempleron. Ŝatantoj de la originala prozo plezure legos novelon de Georgi *Mihalkov,* kaj ankaŭ ĝisfundan recenzon de William *Auld* pri la grandioza verko de Kálmán *Kalocsay* «Tutmonda Sonoro».

En nia serio pri la regionoj de Hungario ni prezentas la okcidentan departementon *Vas.* Alia artikolo informas pri la interesa demando, kiel oni loĝas en Hungario? Denove aperas informoj pri la specifaĵoj de la hungara ekonomia sistemo, kiu ekde la komenco de tiu ĉi jaro certigas specialajn agadformojn por privatuloj, celante tiel plibonigi la servojn en nia lando.

Ni havas la okazon saluti du elstarajn esperantistojn, antaŭajn ĉefredaktorojn de nia revuo: Lajos *Kökény,* kiu plenumis sian 60-an jaron fine de 1981. La nuna prestiĝo de «Hungara Vivo» estas frukto de ilia senlaca, kompetenta laboro, kaj pro tio ni ĉiuj, nunaj redaktoroj kaj legantoj egale ŝuldas profundan dankon al ili.

Tiu ĉi numero iom malfruas, tamen kompense atendu tre baldaŭ, post ĉirkaŭ nur monato la sekvan, el kiu certe ne mankos originala poezio, bona tradukita prozo kaj recenzoj, kiuj helpas al ni orientiĝi en la ĉiam pli vasta Esperanta literaturo.

KRONIKO DE DEK TAGOJ

Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj
(Budapeŝto, 1982. 03. 19 – 28.)

La Esperanta Kulturo havis gravan feston inter la 19-a kaj 28-a de marto 1982 en Budapeŝto: enkadre de Budapeŝta Printempa Festivalo okazis **Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj** *kun entute dek du teatraj prezentadoj fare de aktoroj el kvar landoj: Francio, Hungario, Pollando kaj Sovetio. Pri la* **Renkontiĝo** *aperis faldfolio prezentanta la kontribuantajn trupojn kaj la prezentatajn teatrajojn, kaj aperis pri ĝi kaj pri la historio de Esperanto-teatro informoj en ĉiuj oficialaj eldonajoj (tiuj aperis amase en pluraj lingvoj) de Budapeŝta Printempa Festivalo. Tiun ĉi* **Renkontiĝon** *fakte iniciatis kaj financis Hungarlanda Turisma Oficejo, konforme al la rekomendoj, kiujn akceptis la Monda Konferenco de Turismo, okazinta antaŭ tri jaroj en Manilo. Ĉi-sube vidu kronikon de tiuj dek tagoj, kiuj vekis vastan reeĥon ankaŭ en la nacilingva gazetaro, radio kaj televido.*

La Teatro „Miklós Radnóti", kie okazis la Renkontiĝo

(Foto de Z. Fejér)



Unua tago: «Profeta premiero»

La 19-an de marto je la sepa hor vespere estis plenplena la Budapeŝt Teatro „Miklós Radnóti". Esperantis toj plenigis ĝin, por ĉeesti la prem eron de la teatrajo „Ĉu vi vidis jar la piedsignon de l' Profeto? " de Jáno *Elem*. (La teatrajo aperis ankaŭ libro forme, en dulingva – hungara-Espe ranta – eldono. Ĝi mendeblas ĉe ĉiu libroservoj.) Tamen, antaŭ ol komenc iĝis la spektaklo, aktorino Virág *Dőr* laŭtlegis Esperante kaj hungare l salutleteron, kiun sendis al la Renkon tiĝo Baldur *Ragnarsson*, vicprezidant de UEA. Post tio d-ro Imre *Pethes* vicprezidanto de Hungara Esperanto Asocio oficiale malfermis la **Renkon tiĝon**.

Tiu prezentado de „Ĉu vi vidis jar la piedsignon de l' Profeto? " esti vera premiero, ja ĝi verkiĝis en l hungara lingvo, tamen ĝi ne aperi ankoraŭ sur hungaraj scenejoj: ĝi sur sceniĝis la unuan fojon nun – e Esperanto. Ĝi ĉerpas sian temon e medio korproksima kaj konata po esperantistoj: turismo kaj interkomp reniĝo. Jen koncize la intrigo:

Fantazia turisma entrepreno orga nizas ekskurson al dezerto kaj kontra alta pago ĝi disponigas al la parto prenantoj „kompletan turisman mal kompleksecon", t.e. oni lasas ilin po du semajnoj meze de la dezerto, ku nutrajoj kaj tendoj, sen ia ajn prog ramo. La ĉiĉerono, kiu cetere n komprenas, nur parolas (!) la lingvo de la turistoj, adiaŭas ilin jene: *„S plaĉos al vi, proklamu vin reĝoj, bor tunelon tra la dezerto, seksperfortu eĉ amu unu la alian, buĉu vin men kaj viajn gekunulojn, kreu novan ŝta toformon, blasfemu, ignoru la aliaj*

Aktorino Virág Dőry laŭtlegas la salutletero de Baldur Ragnarsson. Dekstre de ŝi d-ro Imre Pethes, maldekstre Vilmos Benczik, vicprezidanto resp. estrarano de HEA (Foto de Z. Fejér)

ŭ provu kompreni vin al ili..." El iu situacio kompreneble kreiĝas kaj konfliktoj kaj amuzaj scenoj, sed ne mankas ankaŭ lanĉo de filozofiaj demandoj, ekzemple: „kion oni faru, estante libera?" La rolojn de diversaj turistaj tipoj plenumis elstaraj hungaraj aktoroj, tutlande konataj per filmoj kaj televido. Ili konatiĝis en 30-hora intensa kurso kun la baza gramatiko kaj kerna vortaro de Esperanto, kaj nur poste ili eklernis la rolojn mem. Tiamaniere Esperanto fluis el ilia buŝo nature, bele, kiel la propraj vortoj, ja ili ne papage ellernis la tekston, sed vere alproprigis ĝin.

La rolon de la regema direktoro Ernestro plenumis kun sprita improvizemo kaj ĝisfunda kompreno de la figuro Kálmán *Szabó*, kiu cetere jam preparas solistan programon en Esperanto, tiun de la stulteta Jeva la juna aktorino Csilla *Herceg*, ĉe kiu oni ne povas decidi, kiu pli belas, ĉu ŝia korpo aŭ Esperanta prononco? (Per ambaŭ ŝi regalis malavare la publikon.) Ildikó *Pécsi* ludis eminente la rolon de Ina, laŭt-ema virino, kiu amas la homojn, precipe, „se tiuj estas viroj". La turisman teoriulon Roberto ludis Emil *Keres*, kiu estas ne nur direktoro de la gastiganta teatro, sed ankaŭ unu el la plej bonaj nuntempaj aktoroj. Józsa *Hacser* kreis neforgeseblan figuron per la plenumo de la rolo de Mova – moviĝema, grumblanta edzino, veninta kun la edzo fari „adiaŭ-nuptovojaĝon". La edzo, Jan, fiksiĝis en la memoro de la spektantoj per la delikate ellaborita humurplena ludo de Lajos *Tándor*. Denise *Kárpáti* kiel Kristina – juna instruistino naiva kaj entuziasma – impresis ĉefe per sia senceremonia ludo kaj elstara lingva kompetento, dum Zsigmond *Fülöp* vere brilis en la rolo de la papaga ĉiĉerono Idel. Levente *Moravetz* plenumis sukcese la rolon de la drinkema kaj pensema junulo Adamo. Fine sed ne laste ni menciu Rikardon *Horváth*, esperantistan knabeton, kiu prave rikoltis riĉajn aplaŭdojn ĉe la publiko. (Kaj ni ne forgesu pri la „indiĝenaj" gedancistoj: liphara belulo kaj du *nud*brustaj belulinoj – maloftaĵo sur Esperantaj scenejoj...) Reĝisoro estis László *Romhányi*, kiu samtempe funkciis ankaŭ kiel arta gvidanto de la tuta Renkontiĝo.

La publiko montris siajn plaĉon kaj kontenton per longa aplaŭdado. Post la spektaklo okazis bankedeto je la honoro de la geaktoroj, kie gratulis ilin pro la bela prezentado d-ro Endre *Barát*, ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Asocio, sekretario de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento, kaj Márton *Lengyel*, vic-gvidanto de Hungarlanda Turisma Oficejo.

»Ĉu vi ŷidis jam la piedsignon de l' Profeto? " De maldekstre: Denise Kárpáti (Kristina), Levente Moravetz (Adamo), Csilla Herceg (Jeva), Kálmán Szabó (Ernestro). (Foto de Z. Fejér)

„Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? " De maldekstre: Rikardo Horváth (Tomi), Csilla Herceg (Jeva), Levente Moravetz (Adamo), Kálmán Szabó (Ernestro), Ildikó Pécsi (Ina), Denise Kárpáti (Kristina). (Foto de Z. Fejér)



Dua tago: «Ĉu Dio bojas? »

„La Krizalido", Teatro Internacia de Akvitanio jam plurfoje prezentis tiun ĉi pensigan teatraĵon de la franca dramisto *Boyer* kun granda sukceso. En la teatraĵo temas pri kretenino, kiu en la bojado de hundoj supozas aŭdi Dian averton pri tertremo. La aŭtoritatoj sendas sian solan oficiston, kiu en unu persono estas policisto, juĝisto kaj preĝisto (pastro), por ke li silentigu la knabinon, kies delirajoj povus kaŭzi panikon ĉe la loĝantaro. Sed venkas ne li, la sendito de la socio, sed ŝi, en kiu ankoraŭ ne subpremiĝis la naturaj ecoj. Solen kaj Arno *Lagrange* plenumis la du ĉefajn rolojn tre bone, nur ĉe Arno oni povis senti kelkfoje specon de troa stiligo kaj rigideco. Krome, por nefrancaj oreloj necesis iom da trejnado por distingi inter *t* kaj *ĉ*.

„Ĉu Dio bojas? " en prezento de La Krizalido (Francio). Arno kaj Solen
Foto de Z. Fejér

Tria tago: «In memoriam Kálmán Kalocsay»

Tiu ĉi literatura-muzika podia programo okazis en la Sukeraĵejo Korona, tradicia ejo de altkvalitaj literaturaj vesperoj en la hungara kaj aliaj lingvoj. La „dommastrino" de la vespero estis aktorino Lilla *Mikes*, kiu ne la unuan fojon ravis esperantistan publikon per sia esperantlingva deklamado. Precipe bele ŝi prezentis la poemon de László Nagy: „Himno en ĉiuj tempoj". Multajn spektantojn ravis per sia deklamado ankaŭ József *Kovács P.*, kiu pruvis, ke li estas ne nur popularega televida parolisto, sed ankaŭ elstara deklamisto. Aparte altkvalita estis la muzika programo: krom kantoj, tradukitaj de Kalocsay, estis prezentita ankaŭ komponaĵo de la granda versmajstro: ĝin li verkis por la poemo „Maud" de Tennyson. (Kompreneble, ankaŭ ties Esperanta traduko venas de li.) La gekantistoj Gábor *Németh*, Andrea *Zsadon* kaj Anna *Kiss* ravegis la ĉeestantojn, kiuj fine de la programo mem kunkantis kun sinjorino Anna. Programanonciŝto de la vespero estis sinjorino Éva *Farkas-Tatár*, pri Kalocsay faris prelegeton Vilmos *Benczik*.

Cetere, en Abaújszántó, en la naskiĝurbeto de Kalocsay, dum la sama tago oni inaŭguris memortabulon pri la granda esperantista poeto-tradukisto, kaj ankaŭ Kalocsay-straton.

D-ro Imre Pethes, vicprezidanto de HEA transdonas florojn al aktorino Lilla Mikes, „dommastrino" de la vespero kaj al la aliaj kontribuintoj: (de maldekstre) Gábor Németh, Ferenc Oláh, Lilla Mikes, Andrea Zsadon, Éva Farkas-Tatár, Anna Kiss, József Kovács P. Foto de Z. Fejér

Kvara tago: sovetianoj kaj polino

En la kvara vespero Jadwiga *Gibczynska* el Pollando prezentis „Slavajn fabelojn" de *Lesmian*, tre emocie, kun riĉa artista arsenalo: ŝi brilis precipe en la lirikaj partoj. Du aktoroj de Leningrada Esperanto-Teatro prezentis podian koncizigon de la Ŝekspira „Hamleto" en formo kuraĝe eksperimenta kaj impresa. La publiko ĝuis ambaŭ spektaklojn, kaj dankis la eksterlandajn aktorojn per longa aplaŭdo.

Kvina tago: «Zamenhof» kaj ripeto

La 23-an de marto pro nealveno de Pola Esperanto-Teatro oni ŝanĝis la programon, kaj tiu ŝanĝo alportis veran sukceson: Jadwiga *Gibczynska* prezentis – premiere – sian monodramon „Zamenhof". Ŝi bildigis por la publiko la luktoplenan vivon de la aŭtoro de Esperanto per la vivigo de tri virinoj, tre proksimaj al li: la patrino, edzino kaj filino. La klara kaj proporcia konstruo de la dramo, kaj la senceremonia, tamen impresa ludo havigis al la publiko tre belan teatran travivaĵon.

Post tiu spektaklo estis ripetitaj la plej interesaj programeroj de la Kalocsay-memorvespero.

Sceno el „Hamleto", prezentita de Leningrada Esperanto-Teatro. Foto de Z. Fejér

Jadwiga Gibczynska pola aktorino kiel Klara Silbernik. Foto de Z. Fejér

„Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? " De maldekstre: Emil Keres (Roberto) Zsigmond Fülöp (Idel), Ildikó Pécsi (Ina), Denise Kárpáti (Kristina). Foto de Z.Fejér

Sesa tago: «Profeto» ripetiĝas

Ankaŭ ĉe la dua prezento de „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? " la spektejo estis plenplena. Sed ĉifoje ĝin plenigis ne nur esperantistoj, teatraj fakuloj kaj ĵurnalistoj, sed ĉeestis ankaŭ ĉ. 40-membra grupo de diversnaciaj turismaj fakuloj, inter ili pluraj altrangaj funkciuloj de Monda Turisma Organizo (WTO). Dum tiu prezentado funkciis por la elitaj gastoj sinkrona per-aŭdila interpretado de la teatraĵo en la anglan kaj francan.

Sepa tago: Triumfo de artismo

La teatraĵo de B. Vasilev: „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj" antaŭ ĉ. 10 jaroj furoris en multaj teatroj de Eŭropo. Spektintoj de ĉiuj signifaj prezentadoj firme asertas, ke la Budapeŝta prezentado estis unu el la plej bonaj. Ĝi estis ludita ĉ. 300-foje. Kaj nun la sama teamo de geaktoroj kaj reĝisoro revivigis tiun prezentadon de antaŭ ok jaroj. Sed pri kio temas la teatraĵo mem? (Fragmento el ĝi aperis en nia n-ro 1/1982.) Dum la dua mondmilito ie malantaŭ la fronto, en la soveta landinterno ĉefserĝento Vaskov – vundita esploristo – komandas kelkkapan gardistaron de ne tre grava militbazo. Ĉar mankas bataltaskoj, la soldatoj perdas disciplinon, drinkas, ĉasas virinojn. Vaskov daŭre petas de sia ĉefo soldatojn, kiuj ne drinkas kaj virinumas, ĝis fine tiu sendas al li kvin soldatinojn, kaj post kelkaj tagoj eĉ sesan, eksamatinon de iu kolonelo. La ursa ĉefserĝento ne scias kiel rilati al la virinoj, kaj el tio kreiĝas pluraj amuzaj scenoj. La leĝeran etoson tamen de tempo al tempo rompas la soldatinoj kaj ankaŭ la ĉefserĝento mem: klariĝas, ke ili ĉiuj havas animajn vundojn. Vaskov-on forlasis la edzino kaj mortis lia fileto, kaporalo Rita Osjanina perdis la edzon en la dua tago de la milito, Sonja Gurviĉ, judino, nenion scias pri la gepatroj, kiuj verŝajne mortis en la getto de urbo Minsk, Galja Ĉetvertak estas orfino, dolore fanfaronanta ĉiam pri fantazia patrino, al Ĵenja Kolmekova oni

„La aŭroroj ĉi tie estas silentaj": la protagonisto Zoltán Gera (ĉefserĝento Vaskov).

„La aŭroroj ĉi tie estas silentaj": interrompita banado. De maldekstre: Gabi Jobba (Rita), Mária Ronyecz (Liza), Virág Dőry (Jenja), Zsuzsa Liska (najbarino), Athina Papadimitriu (Sonja). Fotoj de MTI



„La aŭroroj ĉi tie estas silentaj". Instruado pri piedtukoj. Zoltán Gera (Vaskov), Mária Ronyecz (Liza), Zsuzsa Szilágyi (Galja).

murdis la tutan familion, por Liza Briĉkina la eksplodo de la milito nuligis la eblon atingi mezlernejon. La tragedio disvolviĝas el hazarda malkovro: Rita, kiu ĉiunokte elŝteliĝas el la bazo por viziti sian fileton en la najbara vilaĝo, en la arbaro renkontas du germanajn soldatojn. Ŝi raportas al Vaskov, kiu decidas kapti ilin. Sed poste, jam malfrue, evidentiĝas, ke estas ne du, sed dek ses germanaj soldatoj, kaj antaŭ ol fariĝus vera batalo, ĉiuj kvin knabinoj mortas. La enhavo de la teatraĵo havas plurajn tavolojn: ĝi estas neforgeseble bela arta monumento por la virinoj, mortintaj dum la milito; ĝi estas ankaŭ potenca protesto kontraŭ *ajna* milito; kaj fine ĝi lanĉas ankaŭ moralan-filozofian problemon: kiagrade gvidanto rajtas disponi pri la vivo de siaj gvidatoj?

La reĝisoro, István *Iglódi*, faris bravaĵon: sur malgranda scenejo li kapablis sorĉi marĉon, arbaron aŭ militbazon, sen rekvizitoj kaj dekoracioj. La sola rekvizito estis grandega reto, kiu en ĉiu momento servis pli efike la draman efekton, ol du kubaj metroj de perfektaj armeaĵoj. La utiligo de spaco kaj tempo estis skrupule ellaboritaj ĝis la plej etaj detaloj, tiel la prezentado havis daŭre plirapidiĝantan ritmon dum du plenaj horoj. La lasta sceno kvazaŭ kronas la tuton: reaperas la kvin knabinoj, jam sen uniformoj, en nigraj jupo kaj bluzo, kaj kantante belegan plorkanton, ili metas po unu kandelon sur la scenejon kaj malaperas - eĉ ne revenas por klini sin antaŭ la publiko.

La publiko per tre longa aplaŭdado kvitancis la majstran reĝisoradon kaj la perfektan ludon de la geaktoroj. La ĉefrolanto Zoltán *Gera* (Vaskov), esperantisto jam de pluraj jaroj, plenumis sian rolon sonigante ĉiujn kordojn de la homa animo. Li estis egale bona kiel kriema suboficiro kaj viro sentanta konsciencriproĉon pro la morto de kvin junaj virinoj. Gabi *Jobba* (Rita Osjanina) formis figuron de disciplinema virino, en kies animprofundo tempestas ŝira doloro. Ŝiaj rapidaj, kurtaj movoj kaj karakteriza, kvazaŭ sufokata parolmaniero bone sentigis la internan streĉitecon. Zsuzsa *Szilágyi* (Galja Ĉetvertak) konvinke prezentis la procezon, dum kiu la stulteta, fantaziema orfino fariĝas matura homo konscianta pri sia viktimiĝo. Athina *Papadimitriu* (Sonja Gurviĉ) formis la figuron de la intelekta, poeziema, malriĉa juda knabino tiel, ke ŝia plenumo elvokis asociadon kun heroinoj de antikvaj grekaj tragedioj. (Ŝi estas grekino, vivanta en Hungario: ŝi fariĝis tre populara hungarlingva aktorino.) Mária *Ronyecz* (Liza Briĉkina) plenumis sian rolon kun profunda liriko kaj naiva ĉarmo, Virág *Dőry* (Ĵenja Kolmekova) aŭtentike ludis la rolon de sortbatita virino, kiu tamen „vivis, kiel indas vivi". Eszter *Szakács* (ĉefkaporalo Kirjanova) bone eluzis la spritajn eblaĵojn de sia rolo; en la du epizodfiguroj faris memorindajn plenumojn Ildikó *Pécsi* kaj Zsuzsa *Liska.*

Oka tago: «La Evento»

La dua prezentado de „La Krizalido" estis Esperanta premiero, de „La Evento" de la franca dramisto *Foissy*, kaj tiu ĉi vespero fariĝis vere *evento* por la spektantoj. La amuzaj scenoj, rezultantaj el paneo de televidaparato, daŭre ridigis la spektantojn, tamen ankaŭ pripensigante ilin pri la osceda *piteco* de la vivo de geedzoj Pito. La elekto de tiu teatraĵo estis plentrafo de Solen kaj Arno *Lagrange*: ili trovis por si rolojn tre adekvatajn al la karaktero de sia talento, kaj tiamaniere ili donacis al la publiko teatran travivaĵon vere memorindan.

„La Evento" en prezento de La Krizalido (Francio). Arno kaj Solen Lagrange kiel gesinjoroj Pito. Foto de Z. Fejér

Naŭa tago: Amatoraj trupoj

Posttagmeze en la Kulturdomo „Láng" la amatora Teatra Trupo „Garabonciás" el la hungara urbo Kecskemét

Sceno el „La naskiĝo de la relikvo", en prezento de la amatora trupo Gorgo (Budapeŝto). Foto de Z. Fejér

Sceno el „La Kastelo de la Blubarba Princo", prezentita de la amatora trupo „Garabonciás" (urbo Kecskemét). Plej maldekstre staras Katalin Varga (Judita). Foto de Z. Fejér



Roberto Bánky kun sia esperantista pupo. Foto de Z. Fejér

prezentis la verkon de Béla *Balázs*: „La kastelo de la blubarba princo", tradukitan de Márton *Fejes*. En la bonege reĝisorita prezentado la plej memorinda plenumo ŝuldiĝas al Katalin *Varga*, kiu estas la sola profesia aktorino en la trupo: ŝi rekreis la figuron de Judita kun korprema sugestieco. Neniel postrestas al ŝi János *Beregszászi* en la rolo de la Blubarbulo; eble nur lia Esperanta prononco ne atingis tiun de la profesia kolegino.

La Teatra Trupo „Gorgó" el Budapeŝto prezentis la erotiketan komedieton „La naskiĝo de la relikvo" de Pietro *Bambi* ĉarme, tamen ne sufiĉe imprese. Estis ankaŭ kritikindaĵoj pri prononco.

Vespere en la Teatro „Miklós Radnôti" triafoje oni ludis la „Profeton". La sukceso ripetiĝis, en ĉeesto de elita gasto: la prezentadon spektis kaj ĉe la fino gratulis la geaktorojn, transdonante al ili floron Béla *Magyari*, kosmonaŭto de Hungara Popolrespubliko. (Li estis rezervulo antaŭ la flugo, se Bertalan *Farkas* lastmomente estus devinta rezigni pro neantaŭvidita kaŭzo.)

Deka tago: Sukcesoj

Posttagmeze rikoltis merititan sukceson la internacie konata esperantista pupartisto Roberto *Bánky* per sia „Pup-cirko". La lerte kunmetita kaj majstre prezentita programo katenis ĉies atenton, eĉ tiun de komencantoj, ĉar la lingvaĵo de la spektaklo estis rimarkinde facila.

La nur 20-minuta „Li trosalis" de *Ĉehov* en la plenumo de Oleg *Popov* kaj Raŝid *Hajrullin* (Leningrada Esperanto-Teatro) estis majstra perado de karakterize rusa humuro al internacia publiko. Kaj la publiko sciis inde aprezi ĝin.

Vespere ripetiĝis „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj". Kiel jam menciite, fine de tiu ĉi spektaklo sur la scenejo brulas kvin grandaj kandeloj super la simbolaj tomboj, kaj la aktoroj ne reaperas antaŭ la publiko. Dum la unua prezentado la florbukedon, kiun ordinare ricevas aktoroj, juna virino metis inter la kandelojn, sur la simbolajn tombojn. Nun tiun faris renoma esperantisto, Bertalan *Farkas*, kosmonaŭto de Hungara Popolrespubliko. Post la prezentado li renkontiĝis kun la geaktoroj kaj la organizantoj en amika kunveno.

Finaj diversaĵoj

Fine de tiu ĉi iom tre longa kroniko staru citaĵo el luksa kajero, kiun eldonis Hungarlanda Turisma Oficejo pri la *Budapeŝta Printempa Festivalo '83:* „Kompreneble ni ripetos venontjare la plej sukcesajn aranĝojn, kiel la Internacian Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj..." Se estos vere tiel, hungaraj – kaj alvenontaj eksterlandaj – spektantoj povos vidi ankaŭ tiujn teatrojn, kiuj ĉi-jare ne povis esti invititaj, kaj la Esperanta kulturo denove fariĝos pli riĉa.

„Li trosalis" de Ĉehov, en prezento de Leningrada Esperanto-Teatro. Oleg Popkov kaj Raŝid Hajrullin. Foto de Z. Fejér

Estas notinde, ke ĉiuj programeroj de la **Renkontiĝo** estis registritaj sur magnetofonkasetoj, fare de bonaj (teatraj) fakuloj. „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? " kaj „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj" estis registritaj ankaŭ sur video-kasetoj nigreblankaj. Do, la vortoj kaj bildoj ne forflugis, ili konserviĝis por la estonto... Tamen, son- kaj video-kasetoj povas registri nur voĉojn kaj bildojn. La etoso de tiu maratona kultura aranĝo registriĝis en la koro de la partoprenintoj.

Amika kunveno post la lasta prezentado. De maldekstre: P.A. Rados (lingva kunlaboranto), Zoltán Gera, Athina Papadimitriu, Bertalan Farkas (kosmonaŭto-esperantisto), Virág Dőry, István Iglódi (reĝisoro), V. Benczik (tradukinto), É. Farkas-Tatár (lingva kunlaboranto), Magda Kun (kunlaboranto de la reĝisoro). Genuas: Mária Ronyecz, Zsuzsa Szilágyi, Gabi Jobba. Foto de Z. Fejér

El „Hungara Antologio"

En 1931 aperis la internacia poezia antologio de Kalocsay: „Eterna Bukedo". Post kvindek jaroj en 1981 Hungara Esperanto-Asocio eldonis ĝian preskaŭ trioble ampleksigitan duan eldonon: la duvoluman verkegon „Tutmonda Sonoro". En 1933 eliris en Budapeŝto „Hungara Antologio" redaktita kaj grandparte tradukita de la sama Kalocsay. Decas do, ke en 1983 aperu ampleksigita dua eldono de tiu multe laŭdita Antologio – ĝin eldonos la ŝtata Eldonejo Corvina. Antaŭvideble la verko enhavos 241 poemojn kaj prozaĵojn de 73 hungaraj aŭtoroj, ekde la komencoj de la hungara literaturo ĝis la nuntempo.

Lőrinc Szabó
(1900–1957)

Songo de Ĝuang Dzi

Jam antaŭ du mil jaroj Ĝuang Dzi
la majstro, montris papilion. – Songe –
li diris – mi 'stis tiu papilio,
kaj nun min embaraso ĝenas ronge.

Jes, papilio mi 'stis, papilio,
kiu dancadis gaje sub la sun',
sen konjektet', ke ĝi 'stas Ĝuang Dzi,
kaj mi vekiĝis, kaj ne scias nun,

ne scias nun – revante li daŭrigis –
kio la vero, kiu estas mi:
ĉu Ĝuang Dzi la papilion songis,
aŭ min nun songas tiu papili'?

Mi ridis ege: – Ej, Ĝuang Dzi, ne ŝercu,
kiu vi estus? Vi 'stas Ĝuang Dzi.
Ridetis li: – La papili' sonĝata
ja kredis, ke la vera estas ĝi.

Ridetis li, mi ŝultrotiris. Poste
min frosttremigis tamen ia tim':
de tiam mi meditis du mil jarojn
kaj pli kaj pli jam dubas la anim',

mi kredas jam, ke ne ekzistas vero,
ĉio 'stas nur imago kaj poem',
kaj Ĝuang Dzi la papilion songas,
ĝi lin, kaj nin ĉiujn tri mi mem.

Tradukis: Kálmán *Kalocsay*

Dezső Kosztolányi
(1885–1936)

Kiel iu, falinta sur la rel'

Kiel iu, falinta sur la rel'

Resentas ĉion el la vivo pasa,
dum muĝe krakas arda rad' frakasa,
zigzagas flagraj bildoj kapon lian,
li vidas, kiel vidis li neniam,

kiel iu, falinta sur la rel':
al fora viv', al malproksima bel'
mi adiaŭas – iĝis ĝi fabel' –
kiel iu, falinta sur la rel'.

Kiel iu, falinta sur la rel'
– malĝoja panoram', terura bel' –
jen mi sur relo, jen mi sub la rad',
la Temp' super mi kuras kun muĝad'.
Kaj malproksime jam la Morto tondras.
Kaj por momento, ĉio sin remontras:
songe', papilioj, mordo kaj miel'.

Kiel al iu, falinta sur la rel'.

Tradukis: Kálmán *Kalocsay*

Mihály Babits
(1883–1941)

Vespera demando

Se la vespero, ĉi karese flata
velurkovrilo nigra, mola, glata,
kiun dissternas vartistin' giganta,
la teron ame estas surkovranta,
kaj tiel zorge, ke post la surmeto
plu staras rekte herbo kaj floreto,
ne iĝas sulko sur la florfolio,
kaj sur flugilo ĉielarke brila
ne perdas la glazuron papilio,
kaj tiel ili sub velur' kovrila
ripozas, sub ĉi glata kaj karesa,
ke ili tute sentas ĝin senpeza:
tiam, la vivo kien ajn vin gvidu,
aŭ hejme, en la bruna ĉambro sidu,
aŭ en kafejo gapu apud glaso
ekbrulon vican de l' sunluma gaso,
aŭ lace, kun la hund', sur mont' malgranda,
rigardu longe al la luno korna,
aŭ kun vi sur la polva vojo landa
veturu la koĉero duondorma,
aŭ sur balanca plank' de ŝipo mara
kapturnu, aŭ sur benko vagonara,
aŭ iru fremdan urbon kaj vagule,
langvore haltu ie, stratangule,
miri la longajn forajn stratliniojn,
kaj la duvicajn lumajn lampradiojn,
aŭ ĝuste en la akva urb', sur Rivo,
dum flamoj floras en opalspegul',
sopiru plore je l' pasinta vivo,
kies memoro estas dolĉa brul',
je l' temp' pasinta, kiu, kvazaŭ sorĉa
lampet', jen brilas, kaj jen estas for,
kies memoro varma, dolĉmaldolĉa
estas samtempe ŝarĝo kaj trezor':
jen, tie via kapo pezmemora
kliniĝos lace al la ter' marmora,
kaj inter beloj kaj plezuroj, drone,
tamen pri tio pensos vi poltrone:
por tio do ĉi belo kaj ĉi bril'?
Tamen pri tio pensos vi, orfkora,
kial silk-akvo? kaj marmor' kolora?
Kial vesper': flugila terkovril'?
Kial montetoj? kial la branĉetoj?
La maro kiun ne semadas hom'?
Kial la fluoj, refluoj sen finoj,
la nuboj, ĉi malĝojaj Danaidinoj,
la sun', ĉi brula Sizifosa ŝton'?
Kial memoroj, printempoj, aŭtunoj?
Kial la lampoj, kaj kial la lunoj,
kial la nefinebla Temp-lini'?
Aŭ, jen ekzemplo de la herb' malforta:
kial ĝi kreskas, se ĝi velkos morta,
kial ĝi velkas, se rekreskos ĝi?

Tradukis: Kálmán *Kalocsay*

Regionoj de Hungario



Departemento Vas

Ĝis nun ni prezentis al niaj legantoj la ĉefurbon kaj kelkajn departementojn el la orienta, respektive suda parto de Hungario. Ĉi-okaze ni transsaltas laŭlonge la tutan landon, kaj priskribas unu el la plej okcidentaj departementoj, t.e. la departementon *Vas* (pron.: vaŝ). Ĝi situas sur la teritorio de Transdanubio, ĉe la hungara-aŭstra landlimo.

La natura ekonomia, kultura kaj administra centro de la departemento estas *Szombathely* (sombathej). Nuntempe ĝi havas 77 000 loĝantojn. Sekve de siaj memorajoj de la Romia epoko, barokaj vidindajoj kaj la jam tradiciaj Savariaj-aranĝajoj, el fremdultrafika vidpunkto la urbo iom post iom fariĝas pli konsiderinda faktoro ne nur en la departemento, sed ankaŭ en la tuta lando. La historio de la urbo komenciĝas en la jaro 43 a.K. La romianoj nomis la urbon *Savaria.* Pluraj Romiaj imperiestroj vizitis la urbon, kiu plenumis ankaŭ la rolon de pagana religia centro. Pri tio atestas la ĝis nun restintaj memorajoj de la t.n. sanktejo *Isis.*

Dum la postaj jarcentoj la urbo travivis multajn ŝanĝojn. Ĝi multe suferis pro militoj, krome ofte malhelpis ĝian evoluon gravaj incendioj. – Hodiaŭ la urbo estas konsiderinda bazo de maŝina kaj malpeza industrio.

La urbeto *Kőszeg* (koeseg), situanta en la nordokcidenta angulo de la departemento, same estas riĉa je historiaj memorajoj, kvankam ili estas multe pli malfruaj kaj ligiĝas ĉefe al la mezepokaj militiroj de la turkoj. En ĝia burĝo la malmultnombra defenda taĉmento malhelpis la turkojn en la plua konkero kaj fiaskigis la okupon de Vieno.

La urbeto, situanta plej supre en Hungario, inter la orientaj montoĉenoj de Alpoj, havas 12 000 loĝantojn. Origine ĝi estas tradicia lernej-urbo, nuntempe ĝi havas iom da tekstilindustrio. En ĝia tuja apudeco leviĝas la plej alta pinto de Transdanubio, la 882 metrojn alta *Irottkő.* Krome Kőszeg abundas je botanikaj specialajoj. Dum la lastaj jaroj oni faris grandajn rekonstruojn en la urbo, sukcese harmoniigante la konservon de la historia etoso kun la komfortbezono de la nuna loĝantaro.

Ĉe la plej norda rando de la departemento troveblas *Csepreg* (ĉep-

„Ĝardeno de ruinoj" en Szombathely

Urbo de aŭtentika historia etoso – Kőszeg





Skulptaĵoj sur la fasado de la romanika preĝejo en Ják



La kuracbanejo en la vilaĝo Bük – ŝatata celo de multaj eksterlandaj turistoj

reg), kies nomo devenas el la dektria jarcento. Tiutempe ĝi estis urbo, nuntempe apartenas al la mezgrandaj vilaĝoj. Post la reformacio oni aranĝis tie plurajn protestantajn sinodojn. Estas menciinda ĝia antikva presejo, kiu funkciis 22 jarojn komence de la deksepa jarcento.

Ĵus apude, la kuracbanejo *Bük* (buek) estas la plej frekventata fremdultrafika loko de la departemento.

La famo de la banejo jam transpaŝis la limon de Hungario. Oni malkovris ĝin dum naftoesplora borado. La termoakvo de 58 °C taŭgas por kura cado de virinaj malsanoj kaj malsanoj de stomako, respektive galo. La banejo funkcias dum la tuta jaro.

El inter la arkitekturaj vidindaĵoj estas menciindaj la iama Kastelo *Szapáry* (sapari), /hodiaŭ Hotel-kastelo/ kaj la gotikstila romkatolika preĝejo.

Sárvár (ŝarvar) havanta 14 000 loĝantojn, estas urbeto kun konsiderinda historia pasinto. Ĝi situas apud la rivero Rába kaj estis loĝata iam en la Romia epoko. La burgo de Sárvár staras ne sur monto, sed sur ebena teritorio.

Proksimiĝante al la okcidenta rando de la departemento, ni atingas la plej faman vilaĝon: *Ják*. Ĉi tie staras unu el la plej malnovaj ekleziaj konstruaĵoj: la dufasada baziliko el la dektria jarcento, famiĝinta ankaŭ en Eŭropo. La preĝejon oni konsideras pro la proporcia internaĵo kaj la pentritaj ornamaĵoj, la plej bela en Hungario.

Körmend (koermend), centro de la samnoma distrikto, situas ĉe la maldekstra bordo de la rivero Rába. La urbeto komence de la deksepa jarcento fariĝis posedaĵo de la familio Batthyány-Strattmann. La duetaĝa kastelo de la familio hodiaŭ estas konsiderinda artobjekto de la departemento. Nuntempe ĝi estas studenthejmo. La konstruaĵon ĉirkaŭas botanika ĝardeno, sur 48 hektaroj, kun multaj grandegaj arbegoj.

La E-movado en la departemento startis antaŭ la unua mondmilito. Organizitaj grupoj tiutempe ankoraŭ ne ekzistis, sed oni uzis Esperanton dum komunaj ekskursoj. En la jaro 1919 komenciĝis la organizado de lingvokursoj en Szombathely, en la kadro de Hungara Esperantista Societo Laborista. Post la sukcesa lingvokurso en 1921 fondiĝis la unua grupo kun 40 membroj, nomita „Burĝa grupo". La duan „Laboristan grupon" oni fondis en 1923, kun 50 anoj.

En 1924 okazis la 6-a Hungarlanda Esperanto-kongreso en Szombathely, kiun partoprenis pli ol 200 gesamideanoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. La „Laborista grupo" en 1925 aranĝis ekspozicion pri la uzado de Esperanto.

Post la dua mondmilito la Fervojista Sindikato starigis apartan Esperanto-sekcion, t.e. Fervojistan Esperanto-grupon.

Ekde la jaro 1963 la evoluo de la Esperanto-movado en la departemento estas seninterrompa. Iom post iom fondiĝis grupoj ankaŭ ekster Szombathely.

En la komenco de la jaro 1981 en la departemento funkciis entute 14 grupoj: 7 por plenkreskuloj kaj 7 por gepioniroj. La sumo de la anoj estis 287. 7 grupoj funkcias en Szombathely, 3 en Körmend kaj po 1 en Kőszeg, Répcelak, Celldömölk, Pankasz.

Ankaŭ la instruado de E montras konvenan bildon en la departemento. Dum la jaro 1981 ekzistis sume 17 kursoj kun 288 personoj.

La Teritoria Komitato de Szombathely ofte okazigas tutlandajn aranĝaĵojn, ankaŭ kun la partopreno de eksterlandaj esperantistoj. Tia estis la Junulara Esperanto-Renkontiĝo pasintjare, kun amasa partopreno.

István *László*

La fortikaĵo de Sárvár



Kiel oni loĝas, kiel oni akiras loĝejon en Hungario?

Lastatempe pluraj niaj artikoloj okupiĝis pri ekonomiaj problemoj de Hungario, respektive pri la vivnivelo de hungaroj, (ekz. „Prezoj kaj produktokostoj" en HV 80/2 ktp.) tamen en tiuj maksimume kelkfrazaj aludoj tuŝis tiun tre gravan temon pri loĝejoj. Aliflanke Hungarion ĉiujare vizitas el la tuta mondo turistoj; ilia nombro dum jaro superas tiun de la Hungaria loĝantaro, kaj estas nature, ke tiuj vizitantoj dum sia restado en nia lando ĉiuokaze trovas por si konvenan loĝeblon ĉu en hoteloj, ĉu en kampadejoj, ĉu en privataj domoj... sed tiuj kontentigitaj, prizorgitaj vizitantoj, kiujn ne tuŝas problemoj de enloĝantoj, ne povas akiri plenan bildon pri loĝeblo de hungaroj; ĝenerale eksterlande ne estas sufiĉe konate, kiel, inter kiaj cirkonstancoj loĝas dek kaj duono da milionoj da hungaroj.

Heredaĵo de l' pasinto

Estas historia fakto sufiĉe vaste konata, ke antaŭ la liberiĝo la loĝeja situacio en Hungario – kompare al la Eŭropa nivelo – estis tre malfavora, postrestinta. En la intermilita periodo aristokratoj kaj la urba riĉularo posedis eĉ plurajn palacojn, dum 5-6 membraj proletaj kaj kamparanaj familioj luis mizerajn senkomfortajn kelajn aŭ subtegmentajn loĝejojn, kiuj konsistis ĝenerale nur el kuirejo kaj ĉambro. Kvankam oni kreis fondusojn por iom mildigi la situacion, tiuj iniciatoj kreskigis nur la nombron de malgrandaj, senkomfortaj loĝejoj, tamen ne en tia mezuro, kiel kreskis la rajtaj pretendoj.

En la lasta antaŭmilita jaro 3820 loĝantoj loĝis en 1000 loĝejoj, kaj en 1000 loĝejoj estis entute nur 1500 ĉambroj. Plejparto de la loĝantaro loĝis profunde sub la averaĝa Eŭropa nivelo. La dua mondmilito eĉ plimalbonigis la situacion; precipe en Budapeŝto kaj en aliaj urboj detruiĝis multe da loĝejoj.

Miliono da novaj loĝejoj

Post la milito la ĉefa tasko fariĝis la rekonstruado; ekde fino de 1944 ĝis 1949 estis riparitaj aŭ finkonstruitaj centmil loĝejoj. Tiel ĝis 1950 la nombro de loĝejoj atingis 2,5 milionojn, kaj tio jam superis la antaŭmilitan nivelon.

Sekvis la unua Kvinjarplano (1951-1955), kiu celis unuavice industriigon de la iama agrara lando. Tiu ĉi plano celis interalie konstruigi 220 mil loĝejojn, tamen pro la nereala planado efektiviĝis nur ties duono. En tiuj jaroj – laŭ koncepto de industriigo – naskiĝis eĉ novaj urboj, kiel Dunaújváros (tiutempe: Sztálinváros), Komló, Kazincbarcika, tamen la ĝenerala tutlanda situacio ne tre pliboniĝis.

Granda evoluo komenciĝis post 1956; En la jaroj 1957-60 ĉiujare konstruiĝis po 60 mil loĝejoj, kaj estis prilaborita plano pri loĝejkonstruado por sekvaj 15 jaroj. Tiu ĉi Dek-kvinjarplano celis ĝis 1975 konstruon de miliono da loĝejoj. Ĝi celis, kaj la celo estis plenumita!

Anstataŭ miliono konstruiĝis unu miliono kaj 50 mil novaj loĝejoj. Nature, la efektiva kresko estis malpli. Ekzemple inter la jaroj 1970-1980 konstruiĝis 864 mil novaj loĝejoj, tamen la efektiva kresko en tiu ĉi jardeko estis nur 418 mil. La evoluo en la pasinta jardeko estis do la plej granda. Arbitre elektante la jaron 1978 ekzemple ni povas konstati, ke la nombro de novaj loĝejoj konstruitaj dum la jaro por mil loĝantoj estis: 8,3. (Por komparo: dum la sama jaro en Aŭstrio tiu ĉi indikilo estis 6,8; en Nederlando 7,7; en Italio 2,7; en FRG 6,1.)

Nuntempe laŭ jarlibro de Centra Statistika Oficejo en Hungario estas 3,5 milionoj da loĝejoj (la nombro ne entenas la nur sezone loĝatajn, ekz. privatajn ripozdomojn.) Laŭ la sama jarlibro la loĝantaro de Hungario estas dek kaj duono da milionoj. Tio signifas, ke 3000 loĝantoj loĝas en 1000 loĝejoj. Ties 43%-oj konstruiĝis post 1960 – tiel do preskaŭ duono de hungaroj loĝas en nova loĝejo. Tiu ĉi proporcio en provincaj urboj estas iom pli alta: 55%-oj.

Duono de la loĝejoj havas du, kvarono tri aŭ pli da ĉambroj. Meza amplekso de la novkonstruitaj loĝejoj tutlande estas 60 m^2-oj.

Nova loĝkvartalo en la norda parto de Budapeŝto

La statistikoj ofte erarigas nin. Kvankam mi tute ne volis aserti, ke la situacio estas kontentiga, aldonendas aliaj ciferoj, konindas aliaj faktoj. Malgraŭ la supre menciitaj, ĉe ni estas manko koncerne loĝejojn.

Nur en Budapeŝto nuntempe estas pli ol 200 mil justaj pretendoj pri loĝejo. Krom konstruo de novaj loĝejoj la ŝtato multe elspezas por rekonstruado, riparado de malnovaj. La tutlanda statistiko ne plene validas por la ĉefurbo; ĉi tie – kvankam en la eksteraj kvartaloj de jaro al jaro kreskas modernaj loĝkvartaloj – 50%-oj de la loĝejoj konstruiĝis ankoraŭ antaŭ la milito, kaj ties 17 procentoj en la pasinta jarcento.

Posedformoj kaj konstruebloj

Koncerne la posedrajton, tutlande 74,5%-oj de loĝejoj apartenas al privatuloj, 25,6%-oj al la ŝtato. Tiu ĉi proporcio interese varias, se ni esploras ĝin detale:

	privata	ŝtata
En Budapeŝto	42,3%	57,7%
en urboj	69,5%	30,5%
en vilaĝoj	92,2%	7,8%

En tiu statistiko videblas, ke en Hungario la plejparto de loĝejoj apartenas al privatuloj. Tio signifas, ke hungaroj estas duone milionuloj, ĉar ekz. planata konstrukosto de 53 m^2-a plenkomforta loĝejo estas 480 000 forintoj, kaj prezo de same granda familia domo varias laŭ ĝia situo inter 600 kaj 800 000 forintoj.

Sed kion faru tiu, kiu ne povas konstrui propraforte, kiu ne posedas centmilojn?

Hungara plenaĝa ŝtatano rajtas pretendi ŝtatan loĝejon, kies dividon aranĝas la lokaj konsilantaroj. Kaj la rajtaj pretendantoj ricevas diversajn favorajojn, rabatojn.

Ekzemple, se la supre menciitan loĝejon ricevas familio havanta aŭ volanta havi du gefilojn, la financaj kondiĉoj aspektas jene:

Planata konstrukosto	480 000
ŝtata apogo	–80 000
socialpolitika favorajo de du gefiloj	–60 000
plimalgrandigita prezo	340 000
deviga pago en konstanta mono (10%-oj)	34 000
donebla ŝtata monprunto (maksimume por 35 jaroj)	306 000
pagenda pagoparto por monato	864 forintoj

Tio estas la aktuala situacio; indas rimarki, ke ekzemple dum la lastaj dekkvin jaroj la prezoj de konstrumaterialoj kaj konstrukostoj pli ol duobliĝis.

Nun, fine de oktobro 1981 kunsidis Centra Komitato de Hungara Socialisma Laborista Partio, kaj dum tiu ĉi kunsido naskiĝis ankaŭ novaj proponoj koncerne la loĝejan situacion. Ekzistas ankoraŭ manko ĉi-terene, sed jam ne tiom kvanta, plie kvalita. Tio estas, kreskis la pretendoj por pli bonaj kaj por pli grandaj loĝejoj.

Kuirejo de laborista hejmo

La sistemoj de loĝejdivido kaj la koncerna subvencia sistemo devos esti reviziitaj. La konservadkostoj kaj riparkostoj de la loĝejoj estas tiel altaj, ke estos necese plialtigi la loĝejan lupagon. (Ekz. luprezo de citita 53 m^2-a ŝtata loĝejo estas 380 forintoj monate. Meza salajro en Hungario estas ĉ. 4500 forintoj monate.)

La ĉi-temaj proponoj kaj programplanoj de la Centra Komitato de Hungara Socialisma Laborista Partio estos en vastaj rondoj demokratie pridiskutataj, kaj konsiderante alparolojn, opiniojn de institucioj kaj privatuloj la finan decidon eldiros la plej supera organo de Hungario: la Parlamento. Kiel ĝi faris ĝis nun: en la intereso de la tuta popolo de la lando.

Márton *Fejes*

Novaj loĝdomoj ankaŭ en vilaĝoj



Noveco ne nepre signifas monotonecon: interesaj domoj en la vilaĝo Emőd (Nord-orienta Hungario)



PORTEBLAJ KASET-MAGNETOFONOJ DE BRG!

KUN MAGNETOFONO VI NENIAM SOLAS!



Produktas:

Magnetofonuzino de la Budapeŝta Radioteknika Fabriko
Kecskemét

Saluto al Mihály Gergely



Okaze de lia sesdekjariĝo kaj de lia dudeka libro

Fine de l' pasinta jaro aperis nova eldonaĵo en hungara libromerkato, tiu de Mihály Gergely, sub titolo: *Szakmám a lelkiismeret.* (Mia fako estas la konscienco.) Sur la kovrilpaĝo aparta surskribo memorigis, ke la libro aperis je la 60-a naskiĝtago de la verkisto.

Malofte kaj esceptokaze ni raportas pri hungarlingvaj eldonaĵoj, kaj se nun tamen, estu permesate al la kronikanto neglekti la devigan objektivecon de recenzanto, ja la verkisto kaj lia verko ne estas simple unu el hungaraj verkistoj respektive ties verkoj, sed precipe interesa por ni, esperantistoj. Bedaŭrinde pro teknikaj malfacilaĵoj jena saluto aperas iom malfrue, kvankam ĝi – laŭ intenco de la kronikanto – volis esti plie naskiĝtaga saluto ol simpla librokonigo.

La nomo de Mihály Gergely estas bone konata por niaj legantoj, ja li – krom esti hungara verkisto – estis dum jardeko ankaŭ profesia esperantisto: ĉefredaktoro de Hungara Vivo, same tiu de nia hungarlingva dumonata revuo de *Világ és Nyelv* (Mondo kaj lingvo).

Jena libro estas jam la dudeka volumo de la verkisto, kies noveloj, romanoj kaj sociografiaj verkoj jam forgesigis, ke li debutis kiel poeto.

Mihály Gergely naskiĝis la 9-an de Novembro en 1921 en Varbó, en duone kamparana, duone minista vilaĝo. Li lernis metion ferlaboristan, finis ankaŭ altlernejon kaj dum sia ŝanĝoplena vivo li estis laboristo kaj oficisto, soldato kaj ĵurnalisto.

En la literatura vivo li sin anoncis unuan fojon en 1942, kaj en 1953 pro sia novelaro „Gepatra tero" li estis honorigata per la literatura premio „Attila József". Ekde 1956 li vivtenas sin per verkista laboro. La herooj de liaj verkoj estas simpluloj de niaj grizaj tagoj, kaj se li priskribas historian epokon, kiel en sia lasta romano (Poeto kaj reĝo – 1979) ankaŭ la mezepoka historio liveras al homoj de nia epoko moralan instruon kaj saĝon.

Li kiel jam konata verkisto aliĝis al Esperanto-movado en la prepara tempo de 51-a Universala Kongreso, kaj li ankaŭ en la hungarlingva gazetaro multe kontribuis al popularigo de la ideo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Precipe interesa estas por ni lia dudeka, jena libro, kies titolo aludas pri lia verkista konfeso jam publikigita kaj radioprograme disaŭdigita: „Mi estas verkisto, mia fako estas la konscienco." Tiu ĉi volumo – kolektaĵo



el liaj pli fruaj publicistikaj laboraĵoj, studoj, sociografiaj verkoj – dividiĝas je tri partoj. La unua enhavas ankaŭ la libroforme jam trifoje eldonitan: „Pamfleto pri sinmortigo". Kvankam kelkaj liaj beletraĵoj aperis en la kartvela, rusa kaj slovaka tradukoj, fakte tiu ĉi lia verko havis pli grandan eksterlandan reeĥon.

Pli ol duonon de la volumo (sub titolo: Por nia dua gepatra lingvo) plenigas artikoloj, diskutartikoloj kaj leteroj de Gergely, en kiuj li okupiĝas pri problemo de diverslingveco, respektive pri la proponita solvo Esperanto, kiun li forte subtenas. Plurajn el tiuj ankaŭ legantoj de Hungara Vivo povis legi siatempe, preskaŭ ĉiuj aperis jam ankaŭ hungarlingve, sed tiel, kolektitaj eble ili pli efikas, pli bone servas al niaj celadoj.

Tria parto de la libro (sub titolo: Pentrita mondo) kiu enhavas priartajn studojn de Gergely pri Bruegel, Martiros Sarjan kaj Niko Pirosmanaŝvili, atestas pri artanaliza kapablo de la verkisto, ĉifoje en pli granda amplekso kaj en pli internacia skalo ol li faris samon sur kolumnoj de Hungara Vivo.

Tiu ĉi dudeka libro estas inda naskiĝtaga surprizo: t.e. okaze de naskiĝtago de la verkisto – ĝi estas valora donaco por legantoj. Rekompence ni deziras en la nomo de liaj kunlaborantoj, tiuj ĉe Hungara Vivo kaj Világ és Nyelv, same en nomo de niaj legantoj, ke li ankoraŭ longe, en sano kaj feliĉo daŭrigu sian laboron, kaj ke li ofte aŭdigu la respektindan kaj estimindan voĉon de konscienco.

M. *Fejes*

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

2. La pramovado

Internaciiĝo signifas la tutmondan integriĝadon de la homaro. Ĝi manifestiĝis en la rapida kreskado de internaciaj rilatoj kaj de la ofteco de la komunikado inter diverslingvaj individuoj. *La internaciiĝo evidentiĝis en la mezo de la 19-a jarcento.* Tiutempe jam pluraj homoj interesiĝis pri la diversaj lingvoplanoj, kiujn oni aperigis por solvi la problemon de internacia lingva komunikado. *Tiuj diverslingvanoj vivis diaspore en la mondo,* geografie disigite. Inter ili mankis la ebleco de ofta lingva komunikado. Tiu komunikebleco estiĝis nur en la jaroj 1875-1905. Tiuj tri jardekoj kondukis la homaron al nova epoko de la internacia komunikado, kaj interalie

Volapuka gazeto ankaŭ nuntempe ekzistas

ebligis la kreon de la Internacia Lingvo.

Revolucio de komunikado

Kvazaŭ uverture de la nova epoko la delegitoj de 21 ŝtatoj subskribis la *Universalan Poŝtan Konvencion* en Berno 1874 10 09 (ekvalidis 1875 07 01). Por internacia kunlaborado en la poŝtaj servoj ili fondis la Ĝeneralan Poŝtan Union, kies nomo de 1878 estas *Universala Poŝta Unio.*

Dum ĝiaj unuaj tridek jaroj plurobliĝis la nombro de la subskribintaj landoj kaj *establiĝis la infrastrukturo de la internaciaj poŝtaj servoj,* esence tiel, kiel ni hodiaŭ konas ĝin. La naciaj poŝtoj iĝis parto de monda sistemo. *La tutmonda poŝta integriĝo efektiviĝis.* Ĝia sekvo estis la dekobliĝo de la internacia letertrafiko dum malpli ol tridek jaroj. *La internacia korespondado malkariĝis kaj atingebliĝis por iu ajn.*

En la samaj jardekoj okazis revoluciaj ŝanĝoj en la presejindustrio. Granda konkurencado, malaltaj prezoj kaj mallongaj presad-tempoj estis la sekvoj, kaj multaj malgrandaj presejoj specialiĝis por produktado de libroj kaj periodaĵoj en relative malgrandaj eldonnombroj. *Ebliĝis la dissendado de malkaraj movadaj periodaĵoj internacie.*

Fine: en Eŭropo finkonstruiĝis la fervoja reto, kiun kvazaŭ plilongigis la transoceanaj ŝiplinioj. La sekvo: amasa internacia persontrafiko estiĝis ĉirkaŭ la jarcentfino. Ebliĝis interalie ankaŭ *internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj de internacia movado,* do, krom la skriba ankaŭ buŝa lingva komunikado inter la movadanoj.

En la favora kondiĉaro la diverslingvaj individuoj vivantaj diaspore en la mondo jam komencis organiziĝi, kaj kiel societa komunumo ili ekaplikis lingvoplanon. Aplikante ĝin en skriba kaj parola formoj la tiel estiĝanta *internacilingva movado kreis la Internacian Lingvon* el la lingvoplano. La movado fariĝis la *socia bazo,* socia portanto de la Internacia Lingvo, *aplikante ĝin en sia internacia funkcio.*

La Volapuka jardeko 1879-1889

Kiel Zamenhof pli malfrue konstatis: „la vera patro de la tuta internacilingva movado" estis *Johann Martin Schleyer* (Oberlauda 1831 07 18 ; Konstanz 1912 08 16), katolika pastro, verkisto kaj filologo. Li verkis interalie pacifisman flugfolion „Kiel oni povas eviti la militojn? " kaj projekton de monda alfabeto. Fine, „dezirante malfermi la vojon al la interfratiĝo de la homaro" li verkis la lingvoplanon Volapuko kaj publikigis ĝin en sia germanlingva poezia revuo *„Sionsharfe",* eldonita en *Litzelstetten bei Konstanz* (Baden, Germanio). Tiu *Entwurf einer Weltsprache und Weltgrammatik für die Gebildeten aller Völker de Erde* (t.e. Projekto de mond-

lingvo kaj mondgramatiko por la 'kleruloj de ĉiuj popoloj de la mondo) aperis en *majo 1879,* kiel aldono de la revuo.

Jam tiu kvarpaĝa plano, kaj des pli la unu jaron poste libroforme aperinta detala vortaro kaj gramatiko akiris novajn kaj novajn adeptojn. En la jaroj *1879-1880 ĉirkaŭ la revuo „Sionsharfe" ariĝis grupeto de la unuaj volapukistoj,* kiuj ekuzis la lingvoplanon. Kvankam la plimulto estis germanoj, jam aliĝis ankaŭ hungaro, aŭstroj, angloj, svedoj kaj italoj.

Antaŭ cent unu jaroj, en *januaro 1881 Schleyer* ekeldonis la unuan internacilingvan movadan gazeton *„Weltspracheblatt – Volapükabled",* dulingvan movadan centran organon de la volapukmovado, kiu en 1889 unulingviĝis kaj ricevis la titolon *„Volapükabled Zenodik"* (ĉesis en 1908). En la jaro 1889 oni jam povis aboni 14 Volapukajn gazetojn! Lernolibroj aperis en pluraj lingvoj, oni tradukis la klasikaĵojn de la belliteraturo kaj verkis eĉ originalaĵojn. (Ekz. en Hungario aperis ses tradukitaj kaj unu originala verkoj).



„Ŝercfolio Volapuka" – titoldesegno de Volapuka humura gazeto

Würtembergischer Landesverband für Volapük (t.e. Vurtemberga Asocio por la Volapuko) estis la unua organizaĵo de la movado, kiun fondis *15 volapukistoj 1882 05 11.* Sep jarojn poste jam plurmil volapukistoj apartenis al la *250 volapukistaj lokaj societoj en 22 landoj.* Proksimume duono de tiuj estis en Germanio.

Kongresoj

Tri volapukistaj kongresoj okazis: Fridrihshafeno 1884 08 25/28; Munĥeno 1887 08 06/09; Parizo 1889 08 19/21. La unuan apenaŭ ni povas nomi internacia, ja la partoprenantoj plejparte estis germanoj, kaj la laborlingvo la germana. Sed en Parizo la 200 kongresanoj uzis jam ekskluzive la Volapukan. Ja en tiu jaro oni jam registris 1237 kvalifikitajn, „diplomitajn" Volapuk-instruistojn.

Dum la dua kongreso oni fondis la 26-membran institucion nomitan *Kadem Volapüka* (t.e. Volapuka Akademio), kies prezidanto estis Schleyer, kaj la direktoro estis August Kerckhoff, ĉefulo de la movado en Francio.

Ne nur la „aŭgusta kongresado" estas tiel *pramalnova tradicio* de la internacilingva movado, ne nur la Akademio, sed preskaŭ ĉio, kio karakterizas la movadon ankaŭ en ĝia unua jarcento. Ekfloris la majstro-kulto ĉirkaŭ Schleyer, aperis la „propra himno" kaj insigno, volapukaj poŝtkartoj kaj glumarkoj. Je granda ĝojo de diversaj kolektantoj en 1886 jam ekzistis Volapukaj insignoj, kravatpingloj, broĉoj, kruĉoj, ĉampanoj, likvoroj, cigaroj. lampoj, ĉapeloj, krajonoj... eĉ valso. En la komenco de 1887 ekveturis sur Rejno la vaporŝipo baptita „Volapük"...

Tamen la jaro 1889 alportis tute neatenditajn eventojn. Sekvis ne triumfa, sed kriza jardeko de la internacilingva movado, dum kiu ĝi preskaŭ tute neniiĝis.

Johann Martin Schleyer (1831-1912)



August Kerckhoff (1835-1905)



L. Kökény kun du eldonoj de sia ĉefverko, „Enciklopedio de Esperanto"

Oni kutimas diri, ke la futuro estas en la manoj de la junuloj, kaj tio estas vera. La nuntempaj junuloj estas la motoroj de nia evoluo, de ili dependas nia morgaŭo, kaj ni ĝoju, se nia junularo vere entreprenas la evoluigon de nia vivo. Sed samtempe ni estu dankemaj al tiuj olduloj, kiuj dum sia tuta vivo estis kaj estas pretaj servi bonajn aferojn, helpas eduki la junulojn kaj multe oferas por tio, ke la nuntempaj junuloj vere fariĝu kiel eble plej baldaŭ plenkreskuloj en la plena senco de la vorto. En la edukado de la junuloj la viv- kaj fakspertoj de la pliaĝuloj estas nemalhaveblaj. La persisto kaj agemo de la maljunuloj estas grava, ekzemplodona faktoro en la edukado de la juna generacio.

Ĉi tiun konstaton ni povas apliki pri la longdaŭra esperantista agado de nia elstara veterano *Lajos Kökény*, kiu la 31-an de majo plenumis sian 85-an jaron. Ĝoje ni salutas lin okaze de lia konsiderinda jubileo, ĉar li faris vere multon por la edukado de la junuloj, kiel mezlerneja pedagogo kaj literaturisto de la Hungarlanda E-movado.

Meritplena esperantisteco

Lajos Kökény 85-jara

Lia vivovojo komenciĝis en 1897 en la nordorienta urbeto Sátoraljaújhely. Post la baz- kaj mezlernejaj jaroj li fariĝis studento de la Budapeŝta Scienca Universitato kaj akiris diplomon kiel mezlerneja profesoro pri historio, hungara lingvo kaj literaturo. Li instruis dum multaj jaroj en mezlernejoj, kaj 15 jarojn en stenografiaj-tajpistaj faklernejoj. En Miskolc li laboris ankaŭ kiel ĵurnalisto.

Ekde 1924 li loĝas en Budapeŝto, tiam li iĝis membro de la parlamenta stenograf-oficejo. Estas menciinde, ke fariĝinte en sia 16-a jaro stenografisto kaj kiel 22-jara esperantisto, li baldaŭ malkovris, ke inter la praktiko de la stenografado kaj tiu de la internacia lingvo Esperanto estas iaspeca spirita parenceco: ili ambaŭ celas antaŭenigi la interkompreniĝon inter la homoj. Tiutempe li aperigis popularajn ortografiajn kaj diversajn stenografiajn librojn.

Post la konatiĝo kun Esperanto (1919) li baldaŭ perfektigis sian lingvoscion kaj en 1928 fondis la gazeton «Hungara Heroldo», kiun li redaktis dum kvin jaroj. Li aperigis ankaŭ tri kajerojn de la «Esperantista Jarlibro» hungarlingve. En 1929 li transplantis la tiaman hungaran stenografian sistemon al Esperanto.

Li aranĝis literaturajn vesperojn, ankaŭ en la Budapeŝta Muzikakademio, kaj faris vastan propagandon por Esperanto, ĉefe inter la jaroj 1928-35, poste 1945-49. En 1947 Literatura Mondo eldonis lian *Popularan Lernolibron.*

Por kvar hungaraj enciklopedioj li verkis artikolojn pri Esperanto. Li estis la ĉefa redaktoro de la baza verko *Enciklopedio de Esperanto.* De 1947 ĝis 1949 li estis Esperanto-parolisto de la Budapeŝta Radio. Krom multaj artikoloj en kaj pri Esperanto, li tradukis novelojn, verkis ankaŭ dramformajn fabelojn, redaktis la kolekton «Ora Duopo» (1966) de J. Baghy kaj K. Kalocsay.

Dum la 1960-aj jaroj li verkis la lernolibron *Ni parolu Esperante.* Ekde 1961 ĝis 1968 li estis ĉefredaktoro de «Hungara Vivo». Dum lia redaktado la revuo tuj leviĝis en la unuan vicon de la Esperanta gazetaro. Li estas diligenta prelegisto; ankaŭ nuntempe li ofte faras prelegojn ĉe la Budapeŝtaj grupoj pri literaturo, lingvistiko kaj movadhistorio.

Inter la jaroj 1960-72 li aperigis sian *Sensisteman Gramatikon* en la monata revuo de HEA «Hungara Esperantisto». Dum la Universala Kongreso en 1966 li faris prezenton pri la historio de Budapeŝto kaj pri tiu de Esperanto.

Ekde 1978 li estas honora prezidanto de HEA. Ankaŭ nun li ne estas sen laboro. Lia nova agado estas verkado de instrufabeloj. Tiujn li intencas aperigi en la hungara lingvo kaj Esperanto.

Kiam ni amike salutas lin okaze de lia elstara naskiĝjubileo, samtempe ni deziras al li pluan, daŭran sanon, kaj ni esperas, ke li ankoraŭ longe fruktuzos siajn amasiĝintajn spertojn por la bono de la hungara kaj internacia esperantistaro.

István *László*

Tristo kaj amo al la homoj

Pentraĵoj de István Fejes

Maljunulo kun ĉevalo

Estas interese, ke mi ekkonis István Fejes pere de Hungara Vivo, kaj pere de liaj grafikaĵoj, kiuj, antaŭ kelkaj jaroj, aperis en nia revuo kiel ilustraĵoj por noveloj de Krúdy. La grafikaĵoj montris delikatan artiston kiu per sia originala stilo talente interpretis la atmosferon en la verkoj de la granda hungara verkisto. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke István Fejes estas pentristo kun neordinara sento al la koloroj kaj tonoj.

Antaŭ nelonge en urbo Kecskemét oni aranĝis lian unuan memstaran ekspozicion en kiu ĉiuj bildoj estas respondoj al doloraj demandoj, kiuj longe turmentis la artiston.

Preskaŭ ĉiuj figuroj, en la bildoj de Fejes, havas grandajn malhelajn okulojn. Tiaj estas la okuloj de arlekeno, de maljuna fervoja deĵoranto, de foira aŭguristo. La papago sidanta sur la kaduka ŝultro de la aŭguristo estas elokventa simbolo: la maljunulo, kiu sur la foirplacoj aŭguras la sorton de la homoj, restis sola kun sia sorto, kun sia malĝoja birdo. Ĉu nia tuta vivo ne estas bunta foiro, kaj ĉu ni ĉiuj ne similas al la maljunulo, kiu sur la ŝultro portas sian birdon – sian sorton?

En la kreado de Fejes apartan lokon havas la temo pri la infanaĝo kaj familio.

István Fejes estas artisto kiu per unu figuro aŭ per karaktera detalo spertas esprimi la buntan variecon de la vivo. Liaj bildoj, realaj aŭ groteskaj, alvokas profundajn pensojn kaj emociojn. Li akre, eĉ dolore perceptas la kolorojn. Pere de la kontrastoj li atingas mirindan efikon. Lia individua vidmaniero, forte simbola kaj esprimiva, havigas al la pentristo elstaran lokon en lia generacio. Liaj koloroj helas, varmas, sed liaj pentraĵoj sugestas triston; triston kaj amon al la homoj.

Georgi *Mihalkov*

(Fotoj de Jakab Regős)

Virino kun bestoj

Por memoro de miaj gepatroj



PANORAMO

Kulturo kaj turismo

Inter la 19-a kaj 28-a de marto 1982 la duan fojon estis aranĝita Budapeŝta Printempa Festivalo. (En ties kadro okazis ankaŭ Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj.)

Hungara Turisma Oficejo lanĉis la ideon de la Festivalo havante la celon krei allogan kulturisman aranĝon en periodo el turisma vidpunkto tre malvigla, kaj tiamaniere havigi enspezojn al hoteloj ktp. Tio brile sukcesis, ĉar dum la Festivalo ĉiuj hoteloj de Budapeŝto estis plenplenaj.

Ne mirinde, ĉar abundis altiraj programoj: oni povis aŭskulti Georgon *Cziffra,* mondkonatan hungaran fortepianiston, kiu vivas en Francio; oni povis vidi ekspozicion de Amerigo *Tot,* hungardevena artisto el Italio; okazis koncerto de la popularega Amanda *Lear* en la nova Sportpalaco de Budapeŝto por 12 000 spektantoj; en la sama ejego estis aranĝita tuttaga prezentado de popolaj dancoj kaj ties komuna instruado al pluraj miloj da homoj.

Grava programero de la Festivalo estis ankaŭ ĉijare la ekspozicio *Vojaĝo '82* en la Etnografia Muzeo. Ĝin partoprenis 66 ekspoziciantaj turismaj entreprenoj el 14 landoj. Dum dek unu tagoj ĉ. 130 000 vizitantoj estis scivolaj pri la oferto de la turismaj entreprenoj: ili kunportis kun si 72 tunojn da propagandiloj. (Inter ili ankaŭ pri-esperantajn, ĉar en la ekspozicio funkciis bele farita Esperanto-stando, kie lertaj propagandistoj popularigis la Internacian Lingvon.)

Kompreneble, Budapeŝta Printempa Festivalo okazos ankaŭ venontjare: inter la 18-a kaj 27-a de marto 1983. Denove oni povos ĝui la virtuozan fortepianludon de Georgo *Cziffra,* italan–hungaran literaturan vesperon kun la partopreno de Amerigo *Tot,* plurajn verkojn de Bartók kaj Kodály prezentotajn de elstaraj artistoj Richard Wagner-vesperon, okaze de la 100a datreveno de lia morto, Brahms-programon (Brahms naskiĝis antaŭ 150 jaroj) ktp. Sed ne povos plendi ankaŭ ŝatantoj de leĝera muziko: operetamantoj havos la eblon aŭskulti kaj spekti verkojn de Imre *Kálmán* kaj Ferenc *Lehár,* okazos jazprogramoj, pop- kaj folk-koncertoj... Kiuj bezonas pli detalajn informojn, tiuj skribu (eblas ankaŭ Esperante) al Turisma Propaganda Entrepreno (IPV) Sekcio de Aranĝoj, H–1441 Budapest, Pf. 41.

Fortepianistoj G. Cziffra kaj Z. Kocsis

Ankaŭ la publiko dancis en Sportpalaco

Amanda Lear alvenanta en Budapeŝto

Popoldanca programo en Sportpalaco

PANORAMO

«Strato Dudek kvina»

La hungara junularo ĉiujare inter la 15-a de marto kaj 4-a de aprilo festas – memore al la gloraj revoluciaj tradicioj de la hungara historio – la t.n. Revoluciajn Junularajn Tagojn. Ĉi-jare tiuj Tagoj havis apartan signifon, ĉar ĝuste antaŭ 25 jaroj, printempe de 1957 fondiĝis Hungara Komunista Junulara Asocio. Omaĝe al tiu datreveno strato de la Budapeŝta urbocentro estis nomita „Strato Dudek kvina", kaj ĝi estis transdonita al la junularo. Dum du tagoj kaj duono en tiu strato okazis aro da kulturaj, artaj kaj politikaj programoj, altirantaj plurajn dekmilojn da Budapeŝtaj gejunuloj.



Inaŭguro de la ekspozicio „Vojaĝo '82"

Popoldanc-ensemblo en „25a Strato"

Filma sukceso

Printempe de tiu ĉi jaro „Oscar-premion por la plej bona eksterlanda filmo" gajnis la hungara-okcidentgermana filmo „Mephisto". Reĝisoro estis hungara, István *Szabó*, kiu jam pruvis sian talenton per pluraj sukcesaj filmoj. „Mephisto" estas adaptaĵo de romano de Heinrich *Mann*; ĝi analizas la sekvojn de la konformisma sinteno de artisto en la faŝisme regita Germanio. Al la sukceso certe grave kontribuis la tre elstara ludo de la protagonisto, la aŭstra aktoro Klaus Maria *Brandauer*.

„Mephisto" fakte jam antaŭ la premio ege populariĝis ĉe la publiko de la produktintaj landoj, en Federacia Respubliko Germanio kaj Hungario.

I. Szabó kaj K-M. Brandauer

Panoramo de „Dudek kvina Strato"

LIBROJ OMAĜE AL LA KODÁLY-CENTJARIĜO

László Eősze: La vivo de Zoltán Kodály en bildoj kaj dokumentoj

El 300, parte unue aperontaj bildoj kaj dokumentoj disvolvigas vivovojo, unuece triobla portreto de komponisto, scienculo, edukisto.
Pliampleksigita jubilea eldono, *aperos en la 2-a jarduono*

Zoltán Kodály — Béla Paulini — Zsolt Harsányi: Johano Háry
(Bibliofila eldono)

La libreto de la populara Kodály-verko aperos en luksa aspekto, simile al Cantata Profana, Psalmus Hungaricus, La Kastelo de la Blubarba Princo, kun specimenoj de muziknotoj, kun ilustraĵoj fare de János Kass kaj kun informa studo.
Aperos je la Festosemajno de la Libro

János Breuer: Kodály-gvidilo

La volumo — simile al la Bartók-gvidilo fare de György Kroó — traktas la komponaĵojn po-ĝenre laŭ kronologio, ĝi konigas iliajn aperon, postvivon, akceptadon. La verko estas fidinda helpilo de ĉiu muzikamanta interesiĝanto pri la tuta verkaro de Kodály.
Aperos en la 2-a jarduono

Zoltán Kodály: Rerigardo I-II.
(Redaktis Ferenc Bónis)

La elekto estas inda spegulo de la Kodály-verkadoj scienca, literatura, muzikeduka. La unua volumo enhavas dokumentojn pri la lukto fare de Kodály por la ĝenerala muzika kulturo, en la dua troveblas studoj, krome muzikkritikoj kaj konfesoj pri la antaŭuloj kaj samtempanoj.
Aperos je Festosemajno de la Libro

NOVAJ MUZIKNOT—ELDONAĴOJ

Falĉistoj hastaj de la valo
(Himfy-kanto), versoj de Sándor Kisfaludy *kun muziko por kantvoĉo kaj fortepiano*

Gavoto por tri violonoj kaj kontrabaso (partituro kaj partioj)

Ĉe la tombo de martiroj — *por koruso kaj orkestro*
(publikigis Ferenc Farkas)

Editio Musica

Editio Musica

Leteroj de Zoltán Kodály
(Redaktis Dezső Legény)

La korespondado, daŭrinta proksimume ses kaj duonjardekojn, donas aŭtentikan bildon pri la eventriĉa vivovojo de Zoltán Kodály. Inter la adresitoj troviĝas elstaruloj de la muzika vivo hungara kaj internacia, komponistoj, interpretistoj, scienculoj, eldonistoj, anoj de la amikaro kaj disĉiplaro de la Majstro.
Aperos en la 2-a jarduono

Tiel ni vidis Kodály — kvindek kvar rememoroj
(Redaktis Ferenc Bónis)

La unua varianto de la libro, enhavinta 35 rememorojn, elĉerpiĝis dum tre mallonga tempo. La korektita kaj pliampleksigita eldono jam enhavos 54 Kodály-portretojn. Al la nomaro de la rememorintoj aliĝis interalie: Antal Doráti, Zoltán Horusinszky, Dezső Keresztury, György Kósa, Lajos Lőrincze, László Somogyi, Júlia Székely, Lajos Vass, Sándor Weöres.
Aperos en la 2-a jarduono

REVUO DE REVUOJ

„Ŝia vizaĝo eĉ ne por momento ŝanĝis la mienon..." – sed dum mi legis plu en HEROLDO pri la malfeliĉa sorto de tiu frazo, mia vizaĝo, kontraŭe al ŝia, ŝanĝis sian mienon pro rido, fine pro neretenebla ridego. Tra manoj de 20 sinsekvaj profesiaj tradukistoj – Sudana, Joruba, Indonezia, Araba kaj aliaj, multaj Eŭropaj – la ĉiutaga frazo de Gogol transformiĝis ĝis plena nerekonebleco. Kiam la rondira tradukado fine refermiĝis, el la originalaj 34 vortoj restis „staranta" nur la pronomo ŜI, sed el la originala *penso* eĉ penco de senco ne briletis. Apenaŭ troviĝas ie redaktoro, kiu akceptus (ĉu pagus?) por la supra frazero tiun „ĉarman" ekvivalenton: „Li ĝoje sonigis tamtamon". Tam-tamen, por esti iom pli serioza, la tradukistoj fakscie penis labori dum tiu eksperimento, kaj verŝajne nur amarmiene priridis la rezultaĉon de la komuna ĉen-tradukado.

Evidentiĝis dum tiu eksperimento la profundaj lingvaj kaj naciaj diferencoj, kiuj kaŭzis plej diversajn miskomprenojn. Sekve okazis tute logike ekglitoj al malsamaj direktoj, kaj pluglitado ĝis komikaĵoj. Kaj sciu, ke la ĉen-interpretado tra pluraj lingvoj neeviteble plioftiĝas, ni aŭdis tion eĉ pri komisionoj relative strikte internaciaj; Dio mia! kiaj mirindaj „prenoj" anstataŭ *komprenoj* povas foje naskiĝi el tiaspeca „moderna" komunikado? ! Ĉu eblos ankoraŭ longe rifuzi la senperan, neŭtralan interlingvon?

Certe, ĉiu devas konscii, ke la tradukado apartenas al la plej malfacilaj specoj de la verkado – jes, nenia eraro! Kvankam al kelkiuj tio ŝajnas facila aventuro sur spuroj de grandaj aŭtoroj. En LITERATURA FOIRO la eminenta artisto, ankaŭ en tradukoj, Georges Lagrange, prave eksplikas la malfacilajojn de la tradukarto, ties proksimecon al la aŭtora verkado. La tradukarton praktikanto devas profunde koni la karakterizilojn de *ambaŭ lingvoj,* la tipojn kaj ecojn de la teksto, ankaŭ pri la entute akirebla efikeco de la kreota teksto en la alia lingvo. Ĝi estos neeviteble transformo de la alilingva originalo, ja tiu ĉi portas siajn alispecajn fenomenojn, simple pro sia deven-lingvo. Portas eĉ tiujn „enhavojn", kiujn la aŭtoro eĉ *ne diris,* fakte ne esprimis. Tiaspecajn forlasojn, elipsojn, la Esperantaj tradukistoj plejofte devas tamen iel esprimi per lingvaj rimedoj. Ĉu li aŭ ŝi trovos ilin? – jen tie kuŝas (foje tre inside) la kerna problemo de la taŭga traduk-ekvivalento: *trovi la trafan!*

Trafe trovi la argumenton – tio estas nia preskaŭ centjara bezono. Ni estas ja el tia ligno skulptitaj, ĉu ne? , ke ni forte emas varbi kaj konvinki – kaj nia movado povas rajte fieri, ke tion ni faras ne por propra, sed por komuna, tuthomara profito. Al tiu ĉiam moderniginda, vere esperantista agado liveris Detlev Blanke en DER ESPERANTIST brilan kompendion de taŭgaj argumentoj. Estas listigitaj abunde da laikaj demandoj kaj opinioj (mi prefere konsideras ilin opinioj, kaj ne argumentoj) al kiuj oni kontraŭmetu niajn raciajn, klarigajn argumentojn responde. Estis instrue kaj plezure legi en pluraj numeroj la bone pripensitajn argumentojn, tre valorajn al ĉiuj agantaj movadanoj; ĉu mi rekomendu aparte ilin por aŭtoroj de novaj propagandiloj kaj varbaj artikoloj? Nepre indas tiucele reeldoni ilin, ĉar en multaj landoj montriĝas ega bezono por vere efika propagando.

Ekzemple en la kontinentgranda Hindujo, pri kies lingva mikso en ESPERANTA FINNLANDO donis d-ro Ranganayakulu, do ne Eŭropano elekstere, interesan skizon. Cetere ankaŭ li estis la ĉefa organizinto de la unua E-kongreso de Hindujo, kie fondiĝis la E-Federacio de Bharato (uzanta la propran landnomon). Tamen, tre modeste el la foro mi kuraĝas dubi, ĉu havus realecon ideo, ke la lingvan problemon inter la lingvoj Hindia, Urdua, Telugu-a kaj ceteraj dekoj solvos nia IL. Tiaspecajn ideojn ankaŭ aliloke iuj lanĉis, tamen mi persone restas ĉe la *internacia* neceso kaj ne ĉe la enlanda rolo de Eo.

Ĉe la najbaro, la giganta Ĉinio, la ĝisnuna argumentado ŝajne maturiĝante alportas grandiozajn rezultojn, pri kiuj certe multaj verduloj eĉ spiron retenante legis en ESPERANTO. Unuafoje okazis en la mondo, ke dudeko da altlernejoj sendis siajn lingvoinstruistojn al tutjara kurso por lerni Esperanton kaj ĝian instrumetodon. Evidente, la altlernejoj okazigos post tiu jaro gravajn E-studadojn, eble eĉ antaŭvidas ĝin kiel devigan studobjekton? Kaj samloke oni ricevas informon pri surprize granda aro da altrangaj, *influaj eminentuloj* de la politika, socia kaj arta sferoj de Ĉinio, kiuj konsideris – nun! – fondi ligon de „Amikoj de Eo". Ĝia prezidanto iĝis Chu Tunan, ano de estraro de la parlamento, kiu samtempe prezidas la asocion por amikaj kontaktoj kun fremdaj landoj. Kontraŭ la bone konata lingva imperiismo de la angla efika kontraŭrimedo povas esti evidente nur la facila kaj neŭtrala Eo – verŝajne tia lingvopolitika ideo komencas venki en la ĉina socio.

„Nelastaj vortoj pri la supersignoj" estas la titolo de artikolo de Bernard Golden en DIA REGNO, kiu estus prefere leginda kun lia artikolo pri la origino de la supersignoj (ESPERANTO). Lia hipotezo, ke Zamenhof i.a. ekhavis tiun ideon pro la litova skribo, estas vere tre probabla; ankaŭ lia konjekto, ke nelaste okazas rifuzo de proponoj por ruze forigi ilin. La malvenkojn de ortografiaj reformoj, bedaŭrinde, sekvos post iom da tempo novaj (esence malnovaj), ripetiĝantaj reformproponoj, kiuj fakte malfortikigas nian pozicion antaŭ la mondo.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

La protekto de lago Balatono

En Hungario dum la lastaj jaroj oni pli kaj pli interesiĝis pri Balatono. La hungara publiko ekhavis multe da zorgo pri tiu alte ŝatata naturtrezoro, por ŝirmi ĝiajn proprecojn atakatajn de la tre rapida teknika evoluo. Post kelkaj surprize malagrablaj perturboj aperintaj ĉe la lago, scienculoj esploris multflanke la vivon, la procezojn de Balatono. La plej gravaj farendoj jam estas listigitaj. La registaro aparte decidis pri multaj taskoj koncerne Balatonon, plenumendaj de la plej diversaj instancoj kaj organizajoj.

Antaŭ ties konigo, ŝajnas preferinde skizi iomete la valorojn de tiu admirinda, granda lago. Nur tiam iĝas vere klare, kiaj konsekvencoj venos, se la damaĝoj minacantaj tiun elstaran trezoron de la naturo de Mez-Eŭropo, ne estus zorge preventataj.

Iu pejzaĝo kreiĝas pro multaj komplekse efikantaj faktoroj, daŭre kaj kontinue ankaŭ pluformiĝas, kaj sekve formas apartan – kvazaŭ memstaran – geografian regionon. Tiaspeca aparte ekzistanta regiono estas en Hungario – inter aliaj – tiu de Balatono, kies grava eco estas – krom ĝiaj geologiaj kaj klimataj cirkonstancoj – la ĉeesto de granda akvoamaso. Kompreneble ankaŭ homaj intervenoj en la naturajn procezojn havis sian gravan rolon ĉi tie.

La haveno de Siófok



Kreiĝo de Balatono

Balatono kreiĝis antaŭ 18-20 mil jaroj, sekve de grandaj movoj en la terkrusto, kiuj efikis en la tuta baseno de Karpatoj. Tiuj krustomovoj determinis la ĉefan direkton de la ventofarita kavo por Balatono; certajn golfojn kaj basenojn lokigis transversaj faŭltoj (romplinioj). La reliefon de la Balatona ĉirkaŭaĵo estis forminta parte vulkanismo; tamen ĝin kreis ĉefe la erozia efiko de la vento kaj akvo, aliflanke la pleniga laboro de la rivera sedimentado. La nuna lago elformiĝis el „girlanda" vico de akvobasenoj, kies golfoj iam kiel longaj branĉoj etendiĝis malproksimen en la nunaj intermontaj basenoj de Füzfő, Tapolca, Hévíz, en la rivervalon de Zala kaj ties ĉirkaŭajn terenojn sude.

La glaciperiodon sekvinta varmiĝo alportis tre gravajn ŝanĝojn. La akvonivelo daŭre malaltiĝis, la fundo sedimentiĝis, kaj la akvosurfaco forte alterniĝis inter 950-600 km², ĝia profundo inter 6-3 m.

La prahistorio rakontas

Jam la paleolitiko-epoko vidis tie ĉi loĝantajn homgrupojn. Restaĵoj de homoj, vivintaj antaŭ 70-80 mil jaroj estis trovitaj ĉe vilaĝo Lovas (tn. kulturo de Szeleta) kaj alispecaj de antaŭ ĉ. 20 mil jaroj apud Siófok (kulturo de Gravetti). Dum la neolitiko la trovaĵoj kaj trovejoj plimultiĝas sur ambaŭ longaj flankoj de la

lago (kulturo de Pécel); poste la kupra kaj bronza epokoj kun multaj trovaĵoj demonstras la kontinuecon de la loĝado tie ĉi. Fine de la bronza epoko kaj en la frua fera epoko disvastiĝas simplaj fortikaĵoj per teraj remparoj, de kiuj la plej granda troviĝas en Tihany.

El okcidento retiriĝis tien ankaŭ keltoj, kies unuaj loĝlokoj kreiĝis ĉe la baseno de Tapolca, sed la dua almovo jam atingis la sudan bordon. Ade kreskis tiutempe la loĝlokoj, la trovejoj. Certaj lokoj manifestas aparte preferitan, kontinuan loĝadon pro tre konvenaj faktoroj – produktiva tero, faŭno, bona trinkakvo –, tiel ĉe Keszthely, Szemes k.a.

Dum la Romia epoko

De kiam Transdanubio estis okupita de la Romiaj legioj, en tiu ĉi provinco, tiam nomita Panonio, Balatono (latine Pelso) daŭre havis gravan rolon. Post militiroj de *Aŭgusto*, la unua imperiestro, la lin sekvinta duonfilo *Tiberio* firmigis la Romian regadon, kreante ĝian Danubbordan limon (limes) kiel defendlinion. Tra la apud-Balatonaj altaĵoj oni konstruis tre gravan militvojon, kiu ligis la plej ekstreman punkton, Aquincum, al la interna, pli suda parto de la provinco, kaj al Nord-Italio. La vivon de la Balatona regiono dum la kvarcent jaroj de Romia regado determinis tiu militvojo, kaj samtempe igis ĝin dense loĝata, ekonomie (kaj strategie) tre grava regiono.

Multe da Romiaj villoj – kamparaj domoj – troviĝis, laŭ arkeologiaj esploroj, en Panonio; plej abunde sur la altaĵoj apud Balatono. Tiun dense loĝatan pejzaĝon karakterizis la menciitaj konvenaj faktoroj, kiuj favoris la kultivadon ekzemple de fruktarboj. Precipe rimarkindaj estas la grupoj de villoj (nia vorto *vilaĝo* aludas al ili) preter la militvojo, kio klare montras la efikon de tiu vojo. Post la kresko de la loĝantaro en la regiono, kompreneble la villoj devis sur pli kaj pli vasta loko disiĝi, kion trudis al la Romiaj sinjoroj ankaŭ la ampleksigo de iliaj bienoj, sekve de la ĝenerala prosperado. Novaj vojoj estis konstruitaj dise tra la bone kulturita regiono, kie oni fruktuzis la bonan akvon krom la bona tero. Sur la norda bordo de Balatono, ĉe la nunaj loĝlokoj, ekz. Tihany, Füred, Almádi kaj multaj aliaj, ĉie estis trovitaj ruinoj de Romiaj villoj aŭ alispecaj spuroj de iamaj loĝlokoj. Ja tie ricevis bienojn la veteranoj (eks-soldatoj) de legioj, por akceli popoligon de la teritorio. Tiu enloĝigo enhavis ankaŭ politikan motivon, celante firmigi la regadon. Poste, kiam la ekonomia nivelo de tiu teritorio tiel plialtiĝis, ke ĝi iĝis grava eĉ por provizado de Italio, komenciĝis koloniado el Italio. De tiam estas troveblaj jam villoj poseditaj de elito de la praloĝantoj, do ne nur tiuj de Romianoj.

La altirforton de tiu ĉi monteta parto de la Balatona regiono aparte firmigis, ke pro la preskaŭ mediteranea klimato la koloniantoj sukcesis – laŭ indikoj en tempo de imperiestro *Probus*, kiu naskiĝis en Panonio – alklimatigi multajn Italiajn specojn de vinberoj kaj aliaj fruktoj. Tiel komenciĝis por jarmiloj kontinua frukto- kaj vinberkultivado, kiu fariĝis tre grava ekonomia karakterizaĵo de tiu regiono.

Estas interese, ke la tien lokigo de veteranoj jam atestas pri ekutiligo de la pejzaĝo kiel ripoza, saniga loko. Tio estas rimarkebla interalie ekzemple ĉe la konstruaĵo-komplekso de Villo Balácapuszta. Temas pri unu el la plej belaj tiamaj villoj, eminente konstruita kaj teknike, kaj estetike, kun riĉaj ornamoj kaj freskoj, mozaikoj en Pompeja stilo.

Romianoj konstruis interalie ankaŭ *kluzon* por defluigi la superfluan akvon de Balatono. Ĝiajn restaĵojn oni trovis apud urbo Siófok. Tiu kaj aliaj hidroteknikaj restaĵoj de la Romianoj en Panonio, krome la konstruaĵoj por la militvojo, eĉ kiel ruinoj bone demonstras la dimensiojn kaj teknikan nivelon de la inĝeniera scio en nia Romia epoko.

La klimato de la Balatona regiono

Temas pri eksterordinare ŝanĝiĝema klimato en tiu regiono. La reganta faktoro el meteologia vidpunkto estas Balatono, same kiel ĝi regas la tiean panoramon.

La akvokolektejo norde etendiĝas ĝis la mezalta montaro Bakony. Somere la kontinenta klimato influas la atmosferon, sed – precipe aŭtune – prezentas sin ankaŭ mediteraneaj efikoj. Okcidente, ĉirkaŭ la rivervalo de Zala dum la tuta jaro persistas influoj de oceanaj aeramasoj, pro kio pli da precipitaĵo falas tie ol en la orienta parto de la regiono.

La akvoamaso de la lago moderigas la klimaton: somere la varmiĝon, aŭtune la malvarmiĝon. Tamen tio validas nur por la lago kaj la ĝin ĉirkaŭanta duonkilometra zono. Tial la somero estas malpli varmega ol aliloke, same la vintro montriĝas malpli frosta ĝis la glaciiĝo de Balatono. La somera maksimumo ĉe la orienta parto estas nur 30-35°C.

Inter la ceteraj fenomenoj estas menciinde, ke la lago igas la aeron

Frumatene ankoraŭ ripozas la boatoj

pli vaporhava, kio difuzante la sunradiojn, faras la tagojn pli sunbrilaj. Ĝuste tiu abunda lumo karakterizas la regionon de Balatono: dum jaro estas 1900-2000 sunbrilaj horoj, kies 3/4 dum la somera duonjaro, de aprilo ĝis septembro. Malgraŭ tio la precipitaĵo estas pli abunda kaj disiĝanta ol sur la Granda Ebenaĵo: jare ĉ. 600-650 mm. La reganta NO-N-a vento agrable efikas por la atmosfero, ĝi faras la nordan bordon modere humida, la aeron senpolva kaj klara.

La hidrografio de Balatono

La surfaco de la lago atingas 600 km² kaj ĝia akvokolektejo ampleksas ĉ. 5800 km². Plej multe da akvo enfluas pere de la rivero Zala. En la norda flanko alfluas rapidemaj riveretoj, karstakvoj el etaj fontoj, kiel ekz. Koloska apud Füred, riveretoj de la baseno Tapolca kaj aliaj. El la varmakva lageto de urbo Tapolca la samnoma rivereto, krome la termofontoj de Hévíz ankaŭ atingas fine Balatonon. Sur la suda bordo paralelaj kanaloj kunigas la akvojn de la ĉirkaŭaĵo por konvene konduki ilin plurloke en la lagon. De tie la defluigindan akvon la kluzo ĉe Siófok lasas flui en la kanalon Sió kaj tra ĝi en Danubon.

La jara akvobilanco de Balatono – laŭ centjaraj mezuroj – estas karakterizebla averaĝe per 630 mm de precipitaĵo sur la laga surfaco, kaj 890 mm da enfluo el riveroj kaj kanaloj, kiel pliiĝo. Aliflanke montriĝas perdo pro forvaporiĝo (920 mm) kaj pere de defluigo (620 mm). Do rondcifere 1500 mm estas la jara turno de la akvo, kaj kalkulante per tri metra averaĝa profundo rezultiĝas, ke la tuta laga akvomaso dum ĉ. du jaroj renoviĝas. Kompreneble la bilanco validas nur longperiode. Laŭmonate la afero statas alie: vintre la plia precipitaĵo ŝveligas, somere la forvaporiĝo malpliigas la akvomason, en bona ritmo alternante. Laŭ la vetero la menciitaj averaĝaj indikoj ofte forte varias. Ankaŭ nuntempe la akvobilancon de Balatono determinas la naturcirkonstancoj kaj aldone la socia-ekonomia ĉirkaŭaĵo.

Tiuj ĉi efikoj estas jam bone rekoneblaj, arte influeblaj, parte ankaŭ kompenseblaj. Ĝuste tiu arta interveno – por akordigi la naturon kaj la bezonon de la socio – estas pli kaj pli necesa, precipe pro la kreskantaj kaj ofte malfavoraj efikoj de la ekonomio kaj pro la pliiĝanta akvobezono.

La sin banantojn interesas, ke la 3-4 metrojn profunda lago somere relative rapide varmiĝas, ĝenerale ĝis 21-23 °C, sed dum la „damne varmegaj" eĉ ĝis 26-28 °C. Kie ĝi estas pli profunda, tie la akva temperaturo proporcie iomete sinkas. Cetere la taga variado de temperaturo nur escepte superas la 2 gradojn. Eĉ dum la plej varmaj tagoj la akvo apenaŭ pli varmas tagmeze ol matene; ankaŭ ne ekzistas signifa diferenco inter diversaj punktoj de Balatono. Ĉe Balatonfüred montriĝas unugrada plivarmeco kompare al Siófok, kion kaŭzas la pli profunden penetranta sunradiado en la nordflanka akvo.

La viva naturo

La flaŭro kaj faŭno de Balatono estas tre variaj. Tie renkontiĝas du flaŭroprovincoj de Hungarlando: tiuj de la Pra-Mátra montaro kaj de Transdanubio. La tn. Panonia stepherbaro karakterizas la mildajn deklivojn de dolomitoj kaj kalkoŝtonoj. La regiono entute apartenas al la „boska zono", kiu preteras la ampleksan, laŭb-arbaran zonon. Tiun la historio kaj geografio aparte atentas, kiel „privilegian sferon" por homa popolado kaj agrokulturo. La arbaroj estas „miksitaj", kun multaj specioj, eĉ sur la sudaj deklivoj – pro ties favora alradiiĝo – vegetas pluraj mediteraneaj kaj submediteraneaj specioj, kiuj postvivis tie ĉi.

La abunda kaj varia vegetaĵo prezentas eminentan vivejon por ĉasindaj mamuloj kaj birdoj, por kaptindaj fiŝoj, do por ekonomie ne neglektinda faŭno. Botanike interesaj arbaretoj, boskoj kaj herbejoj alternas apud la fluejoj; la marĉetoj, stagnaj akvoj kreskigas junkon, karikon, kanon, videblas ofte mato kaj torfomusko en la lokaj vetegaĵasocioj.

Eĉ nuntempe vivas tie tre riĉa birdaro. Eksterordinaran valoron havas la natur-rezervejo de Malgrand-Balatono, ties aparte protektataj vadbirdoj; ardeoj, gruoj, kormorano kaj iliaj multaj parencoj vivas sur restaĵoj de iama vasta marĉo, tamen ankoraŭ sur areo de 1400 hektaroj. La akvon plenigas 43 specioj da fiŝoj kaj multaj moluskoj. Famkonata estas la Balatona sandro, apud kiuj troveblas aliaj deziratai specoj de bonaj fiŝoj: ezoko, karpo, kiuj kune konsistigas ĉ. kvaronon de la fiŝaro de Balatono.

La fokuso de akvosportoj kaj resreŝiĝo

Meze de la pasinta jarcento jam ekprosperis la banado en Balatono. Al tio laŭgrade kaj sinsekve kontribuis la tn. „Suda fervojo", la ŝiptrafiko,

De Balatono reakiritaj areoj



inaŭguro de banej-instalaĵoj de Balatonfüred, Balatonföldvár, Siófok, kaj necese ankaŭ moleoj por la velboatoj. Post la unua mondmilito jare gastis ĉe la lago jam cent mil personoj.

Post la liberiĝo de Hungario la lago iĝis – anstataŭ nur por relative malmultaj – alirebla por ĉiuj. Amase kaj el la tuta lando, el ĉiuj tavoloj de la loĝantaro alvenis regule la refreŝiĝemuloj. Rapide kreskis la nombro de la en- kaj eksterlandaj gastoj, la fremdultrafiko.

Por krei konvenajn cirkonstancojn ĉirkaŭ Balatono favore al la kreskanta aro de en- kaj eksterlandaj gastoj, la Komitato pri Balatono jam delonge strebas per konstruigo de novaj, modernaj hoteloj, havenoj, vojoj, restoracioj kaj aliaj instalaĵoj. Inter tiuj estas menciinda la akvoprovizado por la regiono, krome la nova, akvonivelon regulanta, defluiga kluzo ĉe Siófok.

Sekve de grandaj strebadoj, nun jam 400 mil gastoj povas samtempe ripozi ĉe Balatono; dum unu jaro entute 1,5 milionoj da gastoj. Al ili staras je dispono pluraj muzeoj, en la banejlokoj ekspozicioj, sportaj konkursoj kaj variaj kulturaj-artaj prezentadoj. Dum la Balatona Semajno ĉiujare prelegoj okupiĝas pri interesaĵoj de la regiono. Kongresoj de hidrologoj pritraktas novajn rezultojn kaj problemojn de la pri-Balatonaj esploroj. Estas internacie konataj jam la Medicinaj Tagoj en Balatonfüred, la Biologiaj Tagoj kaj la Georgikon-Tagoj en Keszthely, ekspozicioj en Tihany kaj Keszthely prezentas pentraĵojn kaj aliajn artaĵojn pri Balatono, kaj multaj vizitas la kutime organizatan Renkonton de Folkloraj Skulptistoj en Lelle. La en- kaj eksterlandaj partoprenantoj de Balatona Somera Universitato en urbo Veszprém pere de prelegoj kaj ekskursoj studas la ĉirkaŭaĵon de la lago, ĝiajn arton, folkloron kaj plej belajn pejzaĝojn.

Agrablaj kulturdomoj en ĉiuj apudlagaj vilaĝoj atendas ankaŭ la bangastojn. En la Centra Kulturpalaco de la sindikatoj en Balatonfüred troviĝas teatrejo por 400 spektantoj, en aliaj gravaj banejurboj subĉielaj teatroj



Aerfoto pri la duoninsulo de Tihany

por pluraj miloj ebligas somerajn teatrajn plezurojn. Diversaj soloartistoj kaj grupoj venadas kolorigante la kulturan vivon sur la bordo Balatona.

Muziksemajnoj estas aranĝataj jam de dudek jaroj en la Kastelo Festetich de Keszthely: orkestroj ludas en la parko, kaj kamermuziko, kantoj sonas en la koncertsalono. En la proksimeco, Nagyvázsony, estas prezentataj historiaj, kostumitaj ludoj kun ĉevaloj.

Inter la variaj sportoj praktikataj certe la plej populara, krom la naĝado, estas la velado, karakteriza sportbranĉo de Balatono. Jam ekde la 18a jarcento velŝipoj kuris sur la vasta lagosurfaco – ankaŭ tiu de grafo Széchenyi, plurfoje menciita en tiuj artikoloj. – Antaŭ cent jaroj du angloj eĉ fondis tie ŝipfarejon. Iliaj eminentaj velbarkoj forte kontribuis al popularigo de la velado; baldaŭ fondiĝis Klubo de Balatona Velado kaj aliaj jaĥtokluboj. Ĝuste antaŭ cent jaroj – en 1882 – estis aranĝita la unua granda velada konkurso. La centro de tiu sporto kaj ĝiaj konkursoj iĝis Balatonfüred: fine de la jarcento la Londona „registro" mencias jam 25 hungarajn velbarkojn sur Balatono. Tamen grandajn velŝipojn, jaĥtojn, ties kostojn, eĉ magnatoj ne povis longe permesi al si. La modo ŝanĝiĝis tiurilate, kaj etaj velbarkoj ekuziĝis, sen dungita personaro, kie la manipuladon faris mem la posedanto. La Balatona Jaĥtoklubo de 1912 vaste popularigis la veladon sur Balatono, jam kiel membro de la internacia federacio. Post du jardekoj, en 1933, la hungara jaĥto-asocio (700 membroj) jam aranĝis Eŭropo-ĉampionadon ĉe Balatonfüred.

Nuntempe la velado jam iĝis sporto de amasoj. Oni aranĝas dum la tuta sezono multajn migrajn konkurojn, ĉampionadojn ankaŭ laŭ aĝoj, kaj dum la ceteraj „semajnoj" diversajn internaciajn ĉampionadojn. La inaŭguro de la sezono, solena velo-hiso en Siófok kaj Balatonfüred, estas aparte populara okazo. Dum la lastaj jaroj cetere ankaŭ la moderna formo de la solo-velado, la surfo, tre disvastiĝis sur la tuta Balatono.

Pri la naĝado, pri tiu praa sporto, estas menciinda la „konkursoj de tranaĝado": inter Tihany kaj Siófok, resp. Balatonfüred granda partoprenantaro tranaĝas la lagon okaze de tradiciaj tagoj. Tion oni aranĝas ankaŭ memore al la unuaj kuraĝaj kaj kapablaj tranaĝintoj (ekde la jaro 1836 estas registritaj tiaj rezultoj). Konstruaĵoj de plaĝaj banejoj troviĝas preskaŭ ĉie ĉirkaŭ Balatono, kaj sendube sinbanado estas la plej populara somera plezuro de la centmiloj, kiuj venas tien ripozi.



Aerfoto pri la kloakakvo-purigejo de Balatonföldvár

La remadon malhelpas ofte la kruela ondado. Pro tio la ripozantoj prefere nur „boatadas" – ĉie preter la bordo estas lueblaj tiucele boatoj –, aŭ restas en la relative trankvila golfo apud Tihany, kie kajakistoj kaj kanuistoj aranĝas por si mallongajn aŭ migrajn konkursojn. Longdistancan ekskurson por kajakistoj prezentas la remado sur Danubo, tra la kanalo Sió, al Balatono.

Balatono kiel tre ŝatata amuzocelo instigas la aŭtomobilistojn aranĝi ĉe Tihany ĉiujare sian tutlandan renkonton. Ankaŭ ĉiujare okazas konkursoj por la Balatona Pokalo de aŭtistoj, kaj por memoro de la poeto Attila József. Motociklistoj havas grandiozan konkurson ĉe Fonyód sur konkursejoringo, kaj biciklistoj partoprenas ĉiujare sian „Tour de Balaton", ĉirkaŭ la lago sur la bona ŝoseo.

Naturamikoj povas ĝui la multegajn eblojn de migrado en la regiono, precipe en ties norda flanko. Taŭgaj mapoj, konvenaj vojmontriloj mil kilometrojn longaj turisto-padoj, multaj elvidejoj kaj pluraj „rifuĝejoj", tranoktejoj por la migruloj favoras la amikojn de la arbaroj kaj belaj pejzaĝoj. Oni aranĝas inter diversaj lokoj de la regiono ankaŭ konkursojn por la migrantoj.

En Keszthely kaj Füred okazas grandaj revuoj de rajdistoj kun konkursoj kaj paradoj; en la regiono pluraj rajd-lernejoj troviĝas por plezurigi la amatorojn per – tutcerte – mildaj ĉevaloj.

Ankaŭ vintre ne malpleniĝas la ĉirkaŭaĵo de Balatono. La deklivoj de la montetoj plenas de skiantoj kaj sledantoj. Por la sketantoj prezentas sin la grandioza glacia surfaco de la lago. Denove la velado sur la glacio estas karakteriza por Balatono, cetere jam depost cent jaroj fabrikas tiucele velsledojn la ŝipfabriko de Balatonfüred. Okaze de malvarma vintro la lago rapide glaciiĝas tiel, ke la jam multaj velaj veturiloj kuregas sur ĝia vasta ebeno kun rapido de 80-120 km/horo.

La evoluigo de Balatono

Ĝuste la menciitaj abundaj kaj riĉaj avantaĝoj kaj ecoj de Balatono, devigas la nunan generacion atente gardi ĉiujn ĉi ankaŭ por la estonto. La necesajn disponojn devis prepari zorge plenumitaj sciencaj esploroj sur pluraj kampoj. Kelkaj malfavoraj fenomenoj en la vivo de Balatono estis observitaj jam komence de nia jarcento – sedimentiĝa altiĝo de la fundo, ŝlimiĝo ĉe sablaj bordoj, disvastiĝo de malkonvenaj akvoplanoj (akvopesto k.a.), modifoj de bordo, malboniĝo de akva klareco k.a. – pro kio la Hungara Geografia Asocio iniciatis regulajn esploradojn kaj ekzamenadojn de mezuradoj koncerne studadon de Balatono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Pluraj sciencaj institutoj multe plenumis tiucele. Nuntempe laŭ komisio de la Komitato pri Balatono tiun laboron direktas la Scienca Esplorcentro de Akvomastrumo (VITUKI), kiu kunlaboras kun 20 institucioj por disvolvi la banejkulturon.

Surbaze de la resumitaj esploroj pri Balatono estis difinitaj la ebloj kaj limoj de la homaj intervenoj celantaj efiki favore al la lago. Vastaj esploroj okazis pri akvomastrumo, akvokvalito kaj biologio de Balatono, i.a. oni malkovris la bazojn biologiajn por la akvonivelo-reguligo. Pri damaĝaj efikoj de la agrokultura kemizado, de la industrio kaj urbanizado oni profunde ekzamenis la vegetaĵon de la lago, kaj rekomendis taŭgajn preventojn.

Pro la sedimentiĝo estis necese fari bazajn hidrologiajn ekzamenojn kaj mezuradojn, por esplori ankaŭ la internajn fluojn kaj drivojn en la lago, ĝian balancadon. La inĝeniera transformado de la bordo, la havenaj kaj similaj konstruaĵoj bezonis la taŭgajn teknikajn normojn, difinitajn surbaze de tiuj hidrologiaj esploroj.

La Hungara Akademio de sciencoj serioze atentas la sciencajn esplorojn pri Balatono, precipe pere de ĝia Akademia Komisiono en Veszprém. Antaŭ nelonge – resumante esplorojn de

sovetaj, usonaj, nederlandaj kaj hungaraj fakuloj – oni prilaboris matematikajn modelojn por kontroli kaj analizi la daŭrajn fenomenojn de la Balatona akvo. Tiuj helpas determini la malpliigendajn poluciantajn materialojn, ja iliaj efikoj montriĝis tre variaj, el diversaj vidpunktoj malsame takseblaj. Nun evidentiĝis jam, ke la akvon de Balatono pleje minacas fosforo.

La registaro dum la nuna kvinjaro antaŭvidis 5 mil milionojn da forintoj por protekti kaj disvolvi Balatonon. En tiu kadro jam komenciĝis la necesa restarigo de Malgranda-Balatono, kie devas sedimentiĝi la poluaĵoj portataj de la rivero Zala. Tio estas tre grava por ŝirmi la lagakvon. Konstruiĝas tiucele ankaŭ kanalizadoj kaj kloakakvo-purigiloj: en la ĉefa zono de la ripozejoj baldaŭ sume 65 mil m^3 da kloakakvo estos ĉiutage purigebla. Same gravas, ke fine de tiu planperiodo ĉ. 40% de la tiea kloakakvo estos fordirektata de Balatono, kaj 27% eĉ post purigo ne enfluos rekte en la lagon. Sur granda areo oni ekstermos la akvolenton kaj similan trudherbaron de la lago, precipe ĉe la plaĝoj, havenoj kaj ŝipveturlinioj. Per granda forto estos sedimento, ŝlimo forigataj el la enfluantaj kanaloj, ellevotaj la fosaĵoj, kiujn ili ofte kunportas al direkto de la lago. La Akademia Komisiono en Veszprém laste taksis sukcespromesa la disvolvan programon pri Balatono, aprezante interalie, ke ĝia realigo ĝis 1985 malkreskigos per 14% la nunan organikan balaston de la lago.



Likvido de petrola polucio sur la rivero Zala

Kloakakvo-purigejo de Tapolca



El la multaj, zorge planitaj disponoj nur kelkaj estis nun menciitaj. Estas atendeble, ke ili kontribuos al la protekto de tiu nacia trezoro, de la akvo kaj la ĉirkaŭo de Balatono. Tio ebligos al la hungara loĝantaro, kaj al amasoj da eksterlandaj bangastoj ankaŭ estonte ĝui la plezurojn de tiu grandioza lago.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

KERIPAR

Ŝaŭmfara kaj miksanta maŝino 40-60 litra

APLIKEBLA

Ĉe mezgrandaj kaj grandaj sukeraĵproduktejoj ĉi tiu miksmaŝino estas uzebla por tralabori diversajn materiojn, nome ŝaŭmojn, kremojn, farunaĵojn. Al Al la maŝino aplikeblas diversaj krominstalaĵoj, per kiuj eblas fari plurajn kromajn laborojn, nome: dispecigon, pastigon, mueladon ktp.

TEKNIKA PRISKRIBO

La maŝino estas konstruita sur piedo farita el ŝtallameno veldita. Ĉe la fronta parto de la maŝinstablo troviĝas kaldrontenilo kaj motorujo, en kiu troviĝas la dentradoj kaj ŝaftoj bezonataj por la kvargrada transmisio. La tri alternemovaj miksiloj estas aligitaj al la ŝafto per rapida kuplado. La kaldrono (40 kaj 60 litra) estas levebla al dezirita alteco per la kaldrontenilo kaj fiksebla al ĝi per 2 premfiksiloj. Ĉe la fronta parto de la motorujo troveblas la ŝaftingo de la krommaŝinoj. Al ĝi aplikeblas iu ajn el la diversaj krominstalaĵoj.



TEKNIKAJ INDIKOJ

Longo : 760 mm
Larĝo : 560 mm
Alto : 1135 mm
Pezo : ĉ. 300 kg
Elektraj indikoj: 1,5 kW, 3+N 50 Hz, 380 V
Produktiveco: mikstempo por 7-8 litroj da laktokremo: 25 min.

KROMINSTALAĴOJ ALIGEBLAJ AL LA BAZMAŜINO

- viandomuelilo H–82
- spicaĵmuelilo F–10
- papavmuelilo M–20
- tranĉilakrigilo MH–82–4/1
- tranĉilpurigilo MH–82–6/1
- universala dispecigilo KK–100–1/5

PRODUKTAS:

Entrepreno Produktanta Komercajn Instalaĵojn kaj Maŝinojn KERIPAR
Komerca Direktorejo: Budapest V.
Bajcsy-Zsilinszky út 72.
Telefono: 313-124 Telekso: 22-6237
Disvendas: MŰÁRT kaj VOSZK

Ekonomia regulsistemo kun ŝanĝo de strukturo

Ĉe pasinta jarfino kaj komence de tiu ĉi jaro oni faris plurajn modifojn en la regulsistemo de la hungara ekonomio. La nuna fianca situacio de nia ŝtato kaj la ŝanĝoj de ekstera merkatpolitiko devigas formi tian financan politikon, mastrumadon, kies ĉefa celo estas la kreo de la ekstera kaj interna ekonomia ekvilibro, plimultiĝos la enspezoj de la ŝtata kaso, sed malgrandiĝos la sumo de la subvenciaj forintoj irantaj al la entreprenoj.

Kia ekonomia situacio motivis la 1-an de januaro 1982 ĉi tiun ŝanĝon de la regulsistemo? Unuavice la jam menciita ekonomia kaj financa situacio de la hungara ŝtato. Sed aliĝis al la kialoj ankaŭ la malalta produktiveco kaj organiziteco de niaj entreprenoj.

Dum la pasintaj du jaroj nia ekstera kaj interna ekonomia situacio pliboniĝis, sed la nacia enspezo ne kreskis tiel rapide, kiel estis planite. La elspezoj de la ŝtato (por investado, por sanitaraj kaj kulturaj celoj ktp.) daŭre altiĝis, sed la entreprenaj kaj komercaj enspezoj de la ŝtata buĝeto pli malrapide sekvis la elspezojn. Por la harmonio de en- kaj elspezoj necesis altigi la impostojn de la entreprenoj kaj kooperativoj, bremsi la investadon, malplimultigi la apogcelajn subvenciajn sumojn.

Interesan elementon havas ĉi tiu modifo de regulsistemo: inter la socialismaj landoj unuafoje en Hungario la ŝtato donas pli vastan eblecon por privata entreprenemo kaj stimulas funkciigi la kapitalon de individuoj por fondi *ekonomiajn laborgrupojn, etkooperativojn, fakgrupojn.*

Kial oni permesas fondi – apud la bone funkciantaj ŝtataj grandaj entreprenoj, kooperativoj kaj privataj metiistoj – novajn malgrandajn entreprenojn, kooperativojn? Tiu decido havas plurajn faktorojn. Unu el ili estas la bezono de la loĝantaro por servoj.

En nia lando dum la lasta jardeko la vivnivelo daŭre evoluis, paralele ankaŭ la pretendoj kaj bezonoj rapide altiĝis. Ĉiam pli multajn kaj modernajn varojn, dommastrumajn maŝinojn oni aĉetis, subite plimultiĝis la nombro de la propraj aŭtoj. Sed la riparistaj servoj, ŝtataj entreprenoj kaj privataj metiistoj malpli rapide evoluis, kaj nur pene povis kontentigi la bezonojn. Tiujn bezonojn povas kontentigi nur *malgrandaj* grupoj de fakuloj, ĉar la grandaj entreprenoj kaj kooperativoj povas agadi sur tiu kampo nur kun deficito (pro iliaj grandeco, kaj altaj ĝeneralaj kostoj).

Ekzistas ankaŭ alia klarigo. La kvintaga laborsemajno kreas la eblecon por la pli utila, pli bona uzo de la libera tempo. Ĉiam estis kaj ankaŭ nune troveblas homoj, kiuj dum libertempo klopodas akiri pli multan monon, eĉ per aparta penado, celante aĉetadon (ekz. loĝejon, meblojn, aŭton ktp). La nove enkondukitaj reguloj ofertas vastajn eblojn por tio.

Estas nepra celo de nia ŝtata ekonomio, moderigi la ritmon de la investado, ĉar ĝi signifas nuntempe grandan financan ŝarĝon por la ŝtata kaso. Samtempe, la enbankaj ŝparaĵoj de privatuloj atingas preskaŭ 200 mil milionojn da forintoj; tiu signifa kapitalo ĝis nun apenaŭ povis esti uzita por produktcela investado. Sed se oni certigas eblon por plivigligi la entreprenemon de privataj metiistoj, kapitalposedantoj, oni atingas la pliboniĝon de la servoj sen ŝtata investo.

Kelkaj principoj, kiujn oni respektis ĉe la formulado de reguloj:

– La novajn agadformojn oni apliku en tiuj lokoj, kie la ŝtataj entreprenoj kaj kooperativoj ne kapablas kontentigi la bezonon de la loĝantaro pri servoj. Oni permesu fondon de entreprenoj, kiuj kapablas elaste sekvi la merkatajn pretendojn.

– Ilia jura kaj ekonomia regulsistemo estu simpla; ili havu nek avantaĝojn, nek malavantaĝojn kompare al la ŝtata entreprenaro.

– Oni prilaboru sistemon de financa stimulado, kiu aktivigas la entreprenulojn por pli altnivela, pli efika laboro.

– La ĝisnunan „nigran" laboron la fakuloj, metiistoj povu fari en oficiale organizitaj cirkonstancaroj.

Depost kelkaj monatoj privatuloj luas tiujn ĉi vendejojn. Estas fakto, ke en ili nun la sortimento de la varoj estas pli ampleksa, la priservado pli ĝentila ol antaŭe

Povas lanĉiĝi kelkaj demandoj pri tiuj novaj ekonomiaj agadformoj: por kiuj servoj, kies bezonoj ili fondiĝu, kiuj povas parfopreni en ili, ktp.

Malgrandajn entreprenojn – simile al grandaj – rajtas fondi ministerioj, urbaj, urbetaj konsilantaroj. Malgrandaj entreprenoj diferencas disde la grandaj per tio, ke ili estas pli elastaj, rajtas entrepreni pli multflankajn taskojn. Ili rajtas lui maŝinojn, libere mastrumas per la propraj posedaĵoj, sed ne rajtas ricevi ŝtatan subvencion. Se la entrepreno produktas deficiton, ĝi mem devas aranĝi la financan problemon.

La ekonomiajn laborgrupojn rajtas fondi civitanoj, metiistoj, memstaraj fakuloj. Ili rajtas entrepreni preskaŭ cion, escepte komercan agadon. Ili rajtas agadi ekz. en privata instruado, planado de loĝdomoj, aliaj konstruaĵoj, organizi ties konstruadon, en personotransporto, transporto de varoj, en komputa, aŭ alia organiza laboro, rajtas entrepreni flegadon de maljunuloj aŭ infanoj. La laborgrupo funkcias per sia kapitalo, al la ŝtato ĝi pagas (depende de la grandeco de la mongajno) fiksitan imposton, la restintan mongajnon oni distribuas inter la anoj de grupo. Ĉi tiu tipo de laborkolektivo povas agadi ankaŭ en la hejmo, eĉ post la ordinara labortempo.

La agadsfero de *etkooperativoj* similas ĝenerale al tiu de grandaj kooperativoj, sed la fondon de etkooperativo rajtas iniciati ankaŭ privatuloj. La kapitalon por komenci la agadon kolektas mem la anoj de la estonta kooperativo. La etkooperativoj rajtas fari ĉion, kio por grandaj kooperativoj estus deficitproduktema. Ne ekzistas limigo koncerne la nombron de la membroj, sed ĝenerale ili estas inter 5-100 personoj. La librotenado kaj mastrumado de etkooperativoj estas pli simpla kaj efika, ol tiuj de la grandaj. Oni povas anigi al ili ankaŭ gestudentojn kaj pensiulojn. La mongajno de anoj dependas de la dimensioj, niveloj de la faritaj laboroj. La atingebla persona enspezo superas la ĝeneralan salajro-nivelon.

La *industrian kaj servan fakgrupon* oni fondas en la kadro de ŝtataj entreprenoj aŭ kooperativoj por plenumo de diversaj suplementaj taskoj. Sian mongajnon ĝi utiligas libervole.

La *agrikulturaj fakgrupoj* agadas unuavice en frukto- kaj legomkulturoj, brutobredado. La agro apartenas al agrikultura kooperativo, kaj ĝi transdonas ĝin por uzado al la grupo. La grupanoj, okupiĝantaj pri bredado agadas hejme, mem la kooperativo helpas ilin per konsiloj, nutraĵoj kaj fine ĝi reaĉetas la brutojn. La graveco de tiuj ĉi fakgrupoj estas tre granda en la provizado de la loĝantaro, kaj en eksporto de specialaj brutoj (kolomboj, kunikloj ktp.).

Pri la lueblaj vendejoj kaj restoracioj oni jam povis informiĝi per pli fruaj numeroj de HV. Oni povas konstati, ke ne ĉiuj luitaj restoracioj alportis la esperitan gajnon, tamen la plej kapablaj kaj kuraĝe riskemaj luintoj ne plendas pri manko de enspezoj.

Tiuj multaj ekonomiaj agadformoj, vastigo de privata ekonomia aktivado povas ŝajni nekutimaj en socialisma lando. Tamen ili tute ne tuŝas la esencon de la socialisma ekonomia sistemo: la ĉefaj produktorimedoj estas en komuna posedo, eĉ se tiam kaj tiam funkciigas iun el tiuj privatuloj. La socialisma ŝtato celas per la ŝanĝoj nur tion, kio estas ĝia ĉefa destino: pli efikan organizadon de la sociaj produktofortoj.

József *Szabó*

LEHEL

PLI GRANDA
FRIDUJO

PLI GRANDA
KOMFORTO

Produktas:
HŰTŐGÉPGYÁR

GAJA PAĜO

Korekta vivo!?

– Mi devas konfesi, ke mi estas vere bonkonduta homo! Mi korekte sekvas la preskribojn, ne rompas leĝon, ne trinkas, ne fumas, kaj ne postkuras virinojn. Sed mi ne scias, kiel mi kondutos... kiam mi foriĝos el tiu ĉi prizono...?

⚄

Mi volas cent jarojn

ĝisvivi, sinjoro doktoro! Donu konsilon!

– Nenio pli simplas. Ne koleru, nek ridegu tro. Ne multe manĝu, nek trinku alkoholaĵon, kaj evitu la inojn...

– Kaj ĉu tiam mi atingos la centan jaron?

– Ĉu certe, tion mi ne scias. Sed certe la vivo ŝajnos al vi terure longa.

⚄

Ni kaptu jam malpli tedan temon!

– Vi malfeliĉulo! – kriis la muzikinstruisto, kiam li rimarkis en la violinujo de sia lernanto... maŝinpistolon.

– Ne mi, sed mia paĉjo estas la malfeliĉa! – respondis la etulo ankaŭ surprizite. – Imagu, nun li staras ĉe la bankkaso, kaj eltiros violinon el la ujo...

Vivo, vivo...

– Jes, sinjoro redaktoro, la vivo plenas de malfacilaĵoj! Mi konscias do pri mia devo: mi klopodas fari tiujn por miaj kolegoj.

⚄

Singarda vivo

karakterizas la karan onklinon, kiu vivas sola en vilaĝa dometo, kaj ĉiutage, zorge, ŝi manĝas sian kontraŭkoncipan tablojdon...

⚄

Malfacila vivo

– Mi devas energie lukti por ĉiuj kronoj, kiujn mi ŝtelas... – kriis la bandito al sia monon petanta edzino.

⚄

Viro-vivo

Paŭlo vizitas la amikon, kaj trovas lin lavantan la plankon.

– Petro, Peĉjo – alparolas Paŭlo incitite –, al mi neniam venus *tia ideo* en la kapon.

– Ankaŭ al mi ne – respondas Peĉjo –, tiun ideon inventis mia edzino.

⚄

Ridas la poŝto...

– La letero estas tro peza, sinjoro – deklaras la poŝtisto –, oni devas surglui plian poŝtmarkon.

– Kial? Ĉu tiam ĝi iĝos malpli peza?

... kaj ridas la kuracistoj...

Doktoro dum hejma vizito: Sinjorino, ne donu al via edzo fortan kafon. Tio stimulas lin, kaj sekve li nervoziĝas.

Edzino: Sed se vi vidos lin, kiel nervoza li iĝas, kiam mi prezentas al li malfortan kafon!

⚄

... ĉu ridos la fervojistoj? ? ?

Sinjoro plezure rigardas en la fervoja kupeo ŝla solan kunvojaĝantinon, kaj abrupte alparolas ŝin:

– Ne koleru, sinjorino, sed vi aspektas admirinda!

Ŝi ne respondas. Li daŭrigas:

– Mi neniam estis jupoĉasisto, kredu min, sinjorino! Tamen mi volonte pagus mil kronojn, se vi permesos nur... etan klakfrapeton sur vian, hm... ravan postaĵeton.

Sinjorino (flamokule kaj akre refutas la impertinenton) Kion vi imagas! Terure!

Sinjoro: **Mi pagus du mil kronojn!** ... tri mil! Klaki sur vian nudan haŭton, nur unufoje, permesu! ... Kvin mil mi pagus kun ĝojo!

Sinjorino (la sumoj pli kaj pli elokvente persvadas ŝin) Nu, bone, unufoje, estu laŭ via deziro, sed subigu la kurtenojn... (Ŝi ankaŭ subigas siajn subigendaĵojn) nu, frapu jam, sinjoro!

– diras antaŭen kliniĝante, por prezenti la belan po-postaĵon.

– Mi, mi... tamen, hezitas, sinjorino, frapeti vin...

– Mi jam permesas, kial do ne?

– Ĉar eĉ unu kronon mi ne havas!

E.F.

SCIVOLA PILOTO



KONKURENCO DE LA TELEVIDO

Georgi Mihalkov

LA ROZOJ

El la sezonoj Petro pleje ŝatis printempon. Printempe li sentis sin vigla, energia kaj petola. Sed la ĉijara printempo eble estis la plej ĝoja en lia 40-jara vivo. En la komenco de monato majo lia familio ricevis novan loĝejon. Post 10-jara atendo realiĝis ilia granda familia revo. La loĝejo estis en nova kaj tre malproksima kvartalo de la urbo, sed Petro sentis sin feliĉa kaj fiera. Ĉiumatene li vekiĝis pli frue ol kutime, malfermis la fenestron kaj kelkajn minutojn reve li rigardis orienten, kie la suno alpafis sennombrajn sagojn al la novaj domoj.

La trankvilaj printempaj matenoj vekis en li ĝojon kaj emon por laboro, emon daŭrigi kaj fini sian doktoran disertaĵon, kiun li jam kelkajn jarojn prokrastis. Kaj ĉiumatene li ekiris al sia laborejo, havante kvazaŭ flugilojn.

Sed ĉiam sur la ŝtuparo de la domo li vidis antaŭ si la maldikan kurbiĝintan dorson de maljuna viro. La flegmaj paŝoj de la maljunulo kolerigis Petron, kaj li tute ne povis kompreni kial necesas por tiu ĉi pensiulo je la sesa horo ĉiumatene eliri el la domo. Pli ol klare estis, ke li delonge jam ne laboras kaj simple iras promenadi. Kaj je la kvina horo ĉiuposttagmeze, kiam Petro revenis hejmen, ankaŭ la stranga maljunulo revenis de ie.

Post semajno aŭ du Petro alkutimiĝis al tiuj ĉi renkontiĝoj kaj tute ne interesiĝis, kiu estas la maljuna najbaro kaj en kiu apartamento li loĝas.

Sed foje, kiam Petro revenis de la laborejo, kaj iomete lace paŝis sur la ŝtuparo, la maljuna najbaro, neatendite kaj subite salutis lin:

– Bonan tagon.

– Bonan tagon – meĥanike respondis Petro kaj nun por unua fojo li vidis la vizaĝon de sia najbaro. Ĝi estis plata, glate razita kun kurba nazo. Malantaŭ la dikaj lensoj de liaj okulvitroj kviete rigardis du senkoloraj okuletoj. Nek unu karakteran trajton havis tiu ĉi senmova kaj griza vizaĝo. Petro ne rimarkis, ĉu la maljunulo ridetis aŭ ne, sed eble ankaŭ lia rideto estis tiel senesprima kaj pala kiel lia vizaĝo.

Petro konis multajn similajn vizaĝojn, sed nun tiuj ĉi du grizaj okuletoj malagrable pikis lin. Printempe aŭ vintre, matene aŭ tage similaj okuloj ĉiam brilas per glacia brilo aŭ pli ĝuste ili ne brilas, ili nur respegulas ian palan lumon. Kaj ŝajnis al Petro, ke tiuj ĉi vitraj okuloj ankoraŭ ne rimarkis la alvenon de la printempo, la ĝojan vekiĝon de la naturo.

„Klasika filistro por kiu la plej grava en la vivo estas la modera manĝado kaj regula promenado – meditis Petro – kaj eble tiel li vivas jam pli ol 60 jarojn. Vivo ebena kaj trankvila kiel la akvo en malprofunda marĉo."

Foje matene Petro ne vidis la maljunulon sur la ŝtuparo. „Eble li malsaniĝis aŭ pli frue eliris" – diris Petro en si mem, sed kiam li proksimiĝis al la aŭtobushaltejo, li tuj rimarkis la dorson de sia najbaro, inter la homamaso, kiu jam senpacience atendis la aŭtobuson.

Eble la malgrandaj okuloj de la najbaro ankaŭ rimarkis lin, kaj konata voĉo salutis Petron:

– Bonan matenon, estimata.

– Bonan matenon, sinjoro – respondis Petro kaj ne tre sukcese provis afable ekrideti, pensante ke per tiuj ĉi tri vortoj li plenumis sian najbaran devon. Sed la maljunulo, verŝajne jam tedita de la atendado, alparolis lin:

– Estimata, vi certe malfruiĝos hodiaŭ matene. Jam delonge ne estas aŭtobuso.

– Ne. Mi kutimas pli frue ekiri al la laborejo – lakone respondis Petro.

– Tio estas bona kutimo – kompetente aldonis la maljunulo. – Kiam mi laboris ankaŭ mi kutimis pli frue ekiri al la laborejo. Dum kvardek jaroj eĉ unu tagon mi ne malfruiĝis. Mi jam estas pensiulo, sed ankaŭ nun mi vekiĝas je la kvina horo matene, mi matenmanĝas kaj je la sesa horo mi eliras. Kiam mi laboris, mia ĉefo ĉiam diris al mi: „Sinjoro Alfred, vi estas pli akurata ol la plej perfekta horloĝo."

Petro malatente aŭskultis la inspiran babiladon de sia najbaro kaj kolere pensis, ke ĝuste la ŝoforoj de la urbaj aŭtobusoj ne havas la kutimon de sinjoro Alfred.

Petro naive esperis, ke la frumatena konversacio kun lia parolema najbaro tuj finiĝos post la alveno de la aŭtobuso, sed en la plenŝtopita aŭtobuso ili devis stari unu ĉe la alia kaj la maljunulo daŭrigis la paroladon:

– Jes. Ni, la pli aĝaj homoj, ŝatas frue vekiĝi. Nur por la junuloj estas dolĉa la dormado.

Sinjoro Alfred jam sufiĉe monologis kaj la bona konduto postulis, ke ankaŭ Petro diru aŭ aldonu ion, kaj li preferis demandi:

– Sinjoro, kien vi iras ĉiun frumatenon?

– Ho, estimata, mi havas etan ĝardenon sur Arbustmonteto. Eble vi bone scias, kie troviĝas tiu ĉi monteto; norde de la urbo. Tie, en la ĝardeno, mi havas ankaŭ ĉambreton kaj ĉiutage mi iras tien. Por mia malsano tio estas bonega. Astmon mi havas kaj mi bezonas freŝan aeron. Kiam mi aĉetis la lokon, ĝi similis al ĝangalo, sed iom post iom mi kultivis ĝin. Mi plantis tię bulbojn, ajlojn, terpomojn, kelkajn framb-arbustojn, iomete fragojn, vitojn kaj kelkajn persikojn. Por mi la ĝardena laboro estas ripozo.

„Feliĉa maljunulo – ironie pensis Petro. – Li havas familion, domon kaj ĝardenon kaj li ne vidas pli malproksimen ol la brancoj de la arboj en la ĝardeno. Lia tuta mondo konsistas el kelkkvadrataj metroj sur kiuj kreskas bulboj, ajloj kaj terpomoj." Dum tiu ĉi tago Petro ne kapablis racie labori. Ekstere brilis la printempa suno kaj tra la malfermitaj fenestroj de la kemia laboritorio libere enfluis la vigla urba bruo.

Petro nevole pensis pri la matena konversacio kun sia najbaro, pri lia ĝardeneto kaj Arbustmonteto... Foje, eble antaŭ dek jaroj Petro promenadis sur Arbustmonteto, sed jam preskaŭ ne memoris kiel ĝi aspektis. Ŝajnis al li, ke estis somero kaj la tuta monteto similis al verda bukedo el diversaj fruktaj arboj. Eble nun, printempe, kiam la arboj floras, tie estas mirinde kaj Petro amare rememoris, ke tre malofte li eliras el tiu ĉi ŝtona urbo. Liaj semajnoj estas fermitaj inter la betonaj muroj kaj liaj ripozaj kaj laboraj tagoj fluas kiel malrapida, senkomenca kaj senfina rivero. Liaj pensoj ekflugis pli kaj pli malproksimen, al la provinca urbeto, kie li naskiĝis kaj li vidis sian gepatran domon, kuŝantan sub la malvarmeta ombro de oldaj fruktaj arboj.

Printempe, kiel freŝa estis tie la aero kaj kiel blua – la ĉielo...

La labortago finis, sed Petro sentis sin nerva, laca, malkontenta. Nenion konkretan li faris hodiaŭ. Sur la ŝtuparo de la domo li denove renkontis sian maljunan najbaron. Sinjoro Alfred paŝis malrapide, spirante profunde kaj peze. Eble la hodiaŭa promenado pli lacigis lin. En unu mano sinjoro Alfred portis sian nigran, jam ege elfrotitan sakon kaj en la alia mano – grandan bukedon el rozoj. La rozoj estis kiel flamoj en lia vaksa kaj tremanta mano.

Petro tute ne pensis, ke en la ĝardeno de lia najbaro estas ankaŭ floroj kaj li ne sukcesis kaŝi sian miron:

– Ho! Vi havas ankaŭ rozojn en via ĝardeno!

– Tre multaj kaj diversaj floroj estas tie, estimata – ridete diris la maljunulo.

– Kaj kie vi vendas ilin? – demandis Petro.

Sinjoro Alfred silente alrigardis lin, kvazaŭ ne tre bone komprenante la demandon, kaj poste malrapide diris;

– Mi ne ŝatas la komercon per la beleco de la naturo. La floroj estas ĝojo. Vi havas filineton, estimata, kaj ŝi certe amas la florojn. Tiu ĉi bukedo estu por ŝi – kaj sinjoro Alfred donis al Petro la flamantajn rozojn.

Dum minuto aŭ du Petro senmove rigardis la kurbiĝintan dorson de sia najbaro, kiu malrapide kaj silente malproksimiĝis de li.

Nek la edzino, nek la filino de Petro estis hejme, kaj profunda silento regis en la loĝejo.

Petro faris kelkajn paŝojn en la antaŭĉambro kaj staris antaŭ la nova spegulo. Liaj okuloj estis lacaj. Li nevole komparis sian vizaĝon kun la vizaĝo de sinjoro Alfred. Ankaŭ Petro havis okulvitrojn kaj ankaŭ liaj okuloj estis malgrandaj kaj grizaj.

La rozoj ankoraŭ estis en lia mano kaj rememorigis lin, ke lia filino jam estas 16-jara, sed li eĉ ne unufoje donacis al ŝi florojn. Jam preskaŭ dek jarojn li eĉ unu ekskurson ne faris kun sia familio. Jam de dek jaroj li planas fini sian doktoriĝan disertaĵon. Dum dek jaroj li atendis la novan loĝejon. Dek jarojn li...

Kia estas la valoro de dek jaroj en la vivo de la homoj?

Por mi Esperanto iĝis utila!

INTERNACIA KONKURSO

La supran titolfrazon certe multaj povus ripeti. Utilon kaj avantaĝon vaste alportas Eo – oni devas nur uzi ĝin – tio estas bone konata inter esperantistoj. Sed nun, la *du hungaraj E-revuoj* lancas alvokon por tiuj, kiuj havis kaj fruktuzis *konkretajn, faktajn utilojn* de siaj Esperantoscioj, prefere *en profesia kampo!* Do, ne temas pri utiloj ĉiutagaj de vojaĝo, kolektado de bildkartoj aŭ poŝtmarkoj kaj similaj, eĉ ne pri la – tiom utila – kolektado de bonaj amikoj. Kompreneble ankaŭ tiuj apartenas al la fakaj kontaktoj, al la metiaj aŭ sciencaj studoj, al la alpreno de laborspertoj, eĉ al la helpocela tradukado, kiuj iam aŭ daŭre, foje aŭ kontinue subtenis ies agadojn, helpis kaj donis al li/ŝi profesie gravan, konsiderindan avantaĝo(j)n.

Skribu koncize interesan raporton: kiel tiu utiligo okazis, kiel ĝi komenciĝis kaj disvolviĝis, pri la avantaĝoj kiujn ĝi alportis al la partoprenantoj, kiel aliuloj rekonis ĝin, pri la favoraj kaj malfavoraj cirkonstancoj, k.s. Ni atendas 2-3 maldensc tajpitajn paĝojn kun via portretfoto, eventuale kun bonaj fotoj aŭ desegnoj pri koncernaj scenoj aŭ rezultoj. Limdaton ni ne fiksas!

HUNGARA VIVO kaj nia hungarlingva propaganda revuo, VILÁG ÉS NYELV (MONDO KAJ LINGVO) sinsekve *publikigos* la taŭgajn raportojn *kun la foto* de la verkinto. Post publikigo ni aparte sendos al la aŭtoro la ekzempleron de la revuo(j). Sed unue: sendu interesan raporton!

PRIPENSU DO VIAJN UTILAJN SPERTOJN PERE DE ESPERANTO!

William Auld recenzas TUDMONDAn SONOROn

Tradukisto de la „kvarminuta mejlo"



Kálmán Kalocsay: Tutmonda Sonoro. Poezia antologio en Esperanto, tradukita el 30 lingvoj. Du volumoj, VIII plus 664 paĝoj. Serio „Oriento-Okcidento" n-ro 17 sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio en konsultaj rilatoj kun UNESCO.

Redaktis: Vilmos Benczik.
Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio.
ISBN 963 571 077 1.
Prezo: 66,- ned.gld.

Certe neniu leganto de *HV* bezonas atentigon pri la granda rolo de Kalocsay en la historio de la Esperanta literaturo. Kaj tamen kun la pasado de la tempo la precizaj detaloj pri lia atingo emas svagiĝi en la ombroj de la estinteco, kaj la honorigo de lia nomo emas fariĝi pli klisa ol precize formulita. Eble tial utilas ripeti kaj insisti ĉi tie pri la fakto, ke Kalocsay estis tiu geniulo, kiu preskaŭ sola, per granda fortostreĉo, trenis la Esperantan tradukarton el kruda primitiveco ĝis nivelo altkriteria, fierinda kaj efektive unuaranga. Tiu sincera konstato neniel bagateligas la traduktalenton de Zamenhof (elstare atestatan per ekz-e *Hamleto, Ifigenio en Taŭrido, La revizoro* kaj la *Malnova Testamento*), ankaŭ ne de Grabowski, kies esploroj kaj eksperimentoj sur la traduka kampo ne nur estis validaj, sed ankaŭ rekte stimulis la interesiĝon de Kalocsay. Sed la fruaj tradukoj de Kalocsay – *Johano la brava* (1923), *La tragedio de l' homo* (1924), kaj la lirikoj, kiuj aperadis en la unua periodo de *Literatura mondo* – havis efikon similan al la unua „kvarminuta mejlo": ili pruvis la eblecon de la atingo kaj starigis kriteriojn alstrebotajn poste de ĉiuj samsportuloj. Pro lia ekzemplo, kaj pro la dirita *Literatura mondo*, aliaj tradukantoj aperis – kies tradukojn Kalocsay, kiel redaktoro, ne hezitis poluri cele al atingo de la alta nivelo, kiun li mem starigis.

En 1931 li eldonis sian volumon *Eterna bukedo,* en kiu li prezentis poemojn tradukitajn el 22 lingvoj. Nun jam la esperantistoj en multegaj landoj ricevis tradukmodelojn el sia propra nacia literaturo, povis konstati la eblecojn kaj mem entrepreni similan tradukadon. El tio rezultiĝis interalie ne nur la brila *Hungara antologio* (grandparte laborajo de Kalocsay mem), sed preskaŭ same brilaj alilandaj antologioj (*Ĉeĥoslovaka, Svisa*) kaj – manke de aŭ prepare al tio – specialaj numeroj de *Literatura mondo* dediĉitaj al tiu aŭ alia nacia literaturo.

Kaj tio estis nur la komenciĝo. Dum la cetero de sia vivo Kalocsay daŭrigis sian tradukadon, kaj ekde *Infero* de Dante ĝis *Reĝo Lear* de Ŝekspiro venkis unu post unu pintojn de la tutmonda kulturo. Senĉese li poluris kaj evoluigis, fajnigis kaj rafinigis, sian grandiozan talenton. Estas preskaŭ neeble troigi lian genion, kaj plenmerite li staras apud ekz-e Chaucer (de la angla lingvo), Dante (de la itala) k.a., kiel la patro de unu literatura kulturo.

Nun finfine realiĝis lia lasta ambicio. Vilmos Benczik, kun la helpo de Waringhien, Ada Csiszár, Azzi k.a., kolektis surbaze de *Eterna Bukedo* kaj la neeldonitaj tradukoj de Kalocsay la poezian antologion *Tutmonda sonoro*, kun poemoj tradukitaj el jam 30 lingvoj. Kroniĝas kompletige la kariero de la granda poeto.

Mi iom insiste substrekis supre la genion de Kalocsay, ĉar mi nepre deziras, ke neniu miskomprenu tiun ĉi recenzon. Se mi volas en ĝia kadro diskuti, eventuale kritiki, ion Kalocajan, la legantoj devas scii, ke mi tion faras modeste, plene konsciante pri lia genio kaj pri la fakto, ke eĉ se liaj tradukoj restus eterne definitivaj ili per si mem valorigas la internacian lingvon. Sed kelkfoje licas demandi, ĉu pri tio aŭ alio lia vidpunkto nepre estis tute prava. Finfine, ankaŭ la modoj influas la tradukarton, kaj la angla poeto, T.S. Eliot atentigis, ke ĉiu generacio devas retraduki la klasikajojn por si. Notinde estas, cetere, ke kiam oni komisiis al mi tradukadon de la ŝekspiraj sonetoj, mi estis preta tute kontente akcepti sensanĝe la kelkajn tradukitajn de Kalocsay; sed mia eldonisto insistis, ke la tuto estu de mi mem; kaj tial mi aŭdacis „retraduki" ilin.

Tutmonda sonoro estas duvoluma, sume 664-paĝa. La unua atentidajo estas, ke pli ol triono – efektive 36% – de la tradukteksto konsistas el tradukoj el la klasikaj greka kaj romia literaturoj. Tio en si mem estas gravega kontribuo al nia kulturo: ĉiuj gravaj verkistoj estas bone reprezentataj, krom ankaŭ granda nombro (ĝenerale po unu poemo) el la malfruaj aŭ dekadencaj poetoj en ambaŭ lingvoj. En la greka parto, krom la lirikajoj de Sapfo, Alkajos k.a., abunde reprezentataj per karakterizaj eltirajoj estas la grandiozaj dramoj de Ajskhylos, Sofokles, Eŭripides kaj Aristofanes. Aparte interesa estas „Lysistrata" de tiu lasta, el kiu granda parto (bedaŭrinde tamen ne la tuto) estas tradukita. En „Lysistrata" specialan problemon

prezentas la paroloj de Lampito, kiu en la originalo parolas ne atike (kiel la ceteraj rolantoj) sed dorike. Tion Kalocsay indikas per kreado de apriora vokalŝanĝado. Ekzemple, gratulite pri sia (virina) forto, Lampito respondas:

Jas, par deo, ĉar ni jo ĉeam
gimnastekas, ke l' kalkano lo pugon batas. (p.101)

Tio montriĝas solvo kabineta (sed literature necesa). Okaze de viva prezentado (kiun mi tre volus vidi), la reĝisoro prefere utiligu iun „fremdan" akcenton konatan al esperantistoj – anglan, usonan, francan, germanan, japanan, eble, laŭ la modeloj liveritaj de Duncan Charters per la malnova disko „Ni kantu en Esperanto". „Lysistrata" estas, finfine, komedio.

En la latina parto ni trovas mirindan reprezentadon de la tuta gamo de l' romia poezio: Lucretius, tridek poemoj de Catullus, Vergilius (inkl. longajn pecojn el „Eneado"), odoj de Horatius, Satiroj de Martialis kaj Juvenalis ktp – vere, oni povas diri, ke tiu, kiu trastudis tiun parton de la antologio, havas tre kompletan superrigardon de tiu tuta kulturo.

Sed tradukado el tiuj klasikaj poezioj frontas al unu barilo, kiu povas ŝajni nesupereble: la originalaj metrikoj, kiuj dependas de *tempomezuro* (longaj kaj mallongaj vokaloj) kaj ne, kiel la plimultaj modernaj eŭropaj metrikoj, de la akcento. Nu, tradicie (t.e. kaloĉaje!) Esperanto-tradukoj celas reprodukti laŭeble la originalajn versformojn; krom tio la klasikaj versoj (ekzemple la heksametroj) estas aparte belaj kaj allogaj, ankaŭ karakterizaj, tiel ke la tradukanto nepre sentas sin devigata rekrei ilin en la bela lingvo Esperanto. Al tiu problemo Kalocsay decidis tre grandan porcion de sia vivo, kaj siajn spertojn li priskribas sur 28 paĝoj de *Tutmonda sonoro.* La demando estas, ĝis kioma grado li efektive sukcesis? Liaj eksperimentoj estas aŭtentikaj, kiel ankaŭ la tradukoj. Oni povas sekvi pere de la tekstoj mem la progreson de liaj klopodoj.

Jam en *Lingvo stilo formo* (1931) li proponis solvon kiun li ankaŭ aplikis en *Romaj elegioj* (1932). Tiu solvo dependas de vira cenzuro post la tria piedo. Poste Kalocsay seniluziiĝis pri ĝi; kaj tamen ĝis hodiaŭ ĝi ŝajnas al mi la preferinda solvo. Jen bela ekzemplo de tiu verso:

JUSTA PUNO

Ho, se merite odor' virkapra el iu fetoris,
kaj se jam akris en ost' juste la pigra podagr',
jen la mirinda afer': ĉi du pestojn kune akiris
via rivalo. Li nun amas en via amej',
sed, brakumante en lit', ili ambaŭ morte suferas,
jes, de fetor' la virin' kaj de podagro li mem. (p.176)

Mi preferas ĝin interalie ĉar normala esperantisto scias legi ĝin *laŭakcente.*

Poste Kalocsay iom malesperis solvi la klasikajn metrikojn, kaj poemojn de Catullus (kaj aliaj) li tradukis uzante modernajn ritmojn kun rimoj. Tion faris siatempe ankaŭ diversaj nacilingvaj tradukantoj (laŭ la modo de sia epoko) sed evidente, kiel diris mem Kalocsay, tio „solvis nenion". Ĝi tamen havigis plurajn agrablajn lirikojn ekz-e:

OFENDOJ DE LESBIA

Lesbia antaŭ sia edzo
ofendis min per lang' insulta,
kaj nun kun granda kontenteco
pri tio ĝojas tiu stulta.

Vi, mul', malsaĝas! Se silente
ŝi tenus sin, ŝi estus sana,
sed ĉar ŝi tiel turbulente
min draŝis kun mien' rikana,

ŝi min memoras, eĉ, afero,
pli grava, bolas de l' kolero,
kiu en ŝia kor' sovaĝas.
Jen do, ŝi brulas, do ŝi klaĉas. (p.167)

Plurajn aliajn solvojn de la problemo li provis – mankas spaco por trakti ilin ĉi tie – ĝis li ellaboris verson, kiun li nomas *oktometro,* kaj per ĝi li faris multnombrajn tradukojn. Ĝi certe kapablas liveri al ni fluajn sonorajn versojn:

Ho, ĉu vere, ke l' Britanon ŝminkvizaĝan nun vi imitas,
kaj la harojn vi transfarbas al vi per ora koloril'?
Ĉiun veran formon fiksis la naturo, kaj la Romanaj
vangoj, kiujn Belgaj farboj kaŝas, estas hida vidaĵ'.
Ĉar per bluo jam ŝmiris siajn vangojn iu virino,
ĉu do efektive estus ĝusta jam la blua kolor'? (p.219)

Sed ĝi kapablas liveri ankaŭ versojn nekonvenajn kaj (laŭ mia sento) senformajn:

Sed ŝi diras jam, ke naĝas for la ĵuroj en riverakvo,
kaj vi ŝin jam vidas en la sin' de aliaj, ho lampet'.
(p.140)

Ĉu do entute la oktometro kontentige tradukas klasikajn heksametrojn? Pere de ĝi ni ricevas bonajn tradukojn; kaj tamen ĝi ne kontentigas min – pro du ĉefaj kaŭzoj. Ĝi liveras lingvaĵon ne sufiĉe densan (latinaj tekstoj estas ĝenerale koncizaj); kaj ĝi dependas de la koncepto pri *daktiloj tempmezure puraj,* kiuj laŭ mia humila opinio tutsimple ne ekzistas en Esperanto, ĉar niaj vokaloj estas en ĉiu normala uzado samlongaj.

Alia afero ĝenis min dum legado de precipe grekaj sed ankaŭ latinaj poemoj. Temas pri la abundegaj propraj nomoj. Por kio (kaj kiu) utilas, kiam oni transliterigas la el la greka alfabeto al la Esperanta alfabeto, la literon „y"? Benczik afable informas nin, ke tiun literon oni prononcas 'proksimume kiel „u" en la franca vorto „sui". Dankon. Sed kion komprenu tiuj multnombregaj esperantistoj, kiuj scipovas nek la grekan nek la francan – des pli tiuj, kies orelo ne scias fakte distingi inter ü kaj i? Mi insistas, ke tradukojn oni faras antaŭ ĉio por tiuj, kiuj ne konas la originalajn lingvojn. Kiel esperantistoj sciu prononci Lysistrata, Myrhina, Bombyka, Lityerses? Kiel oni prononcu Cynthia, aŭ Cocytus, aŭ Caecubum, aŭ Chloë? Kio pri Eutykhos? Benczik asertas, ke „estis alprenita nur unu litero „y", sed tio ŝajnas miskompreniga, kiam oni renkontas *Styx* (p.213) aŭ *Torquatus* (p.202), se ne paroli pri la fremda *th,* aŭ pri *kh* ial uzita anstataŭ *ĥ.* Interalie, oni neniam scias, kien meti la akcenton en tiaj

nomoj, krom en tiuj tre esceptaj okazoj, kiam forta ritmo tion indikas, ekz-e:

Hesperos, vi torĉo ora
de la granda Afrodita. (p.138)

En tiu verso, nur la ritmo indikas, ke en *Hesperos* la akcento estas *mislokita* (el vidpunkto de la esperantista leganto). Sed bonvolu diri, kiel oni deklamu ekz-e:

Antiokhos foje vidis la matracon de Lysimakhos
(p.142) ?

Mi devas diri, ke tiu sinteno al propraj nomoj ŝajnas al mi afektema kaj neinda je brila esperantisto. Mi esperas, ke niaj aziaj amikoj konsentas kun mi.

La ceteraj du trionoj de la teksto kondukas nin ekde la akada eposo „Gilgameŝ" (3a iarmilo a.K.) ĝis hungara kaj vjetnama poetoj, kiuj naskiĝis en 1921, kaj ni vizitas survoje amason da poetoj el plej diversaj landoj kaj lingvoj. En tiu parto Kalocsay, malpli turmentita de la neceso solvi la eble nesolveblan, povis galopigi pli libere sian Pegazon kaj havigi al ni tutan stokegon da memorindaj verkoj. El la pra-egipta, ekzemple, li tradukas laŭ sia mirinda lirika talento la „Admonon de skribisto al sia filo", en kiu la skribisto klarigas la dezirindecon de la skriboscio, komparante tiun metion kun aliaj, ekz-e:

– Mi, sandalfaristo,
penas sen ripozo,
vivas el almozo
vivon, kiu aĉas,
la paseo – ranca,
la futur' – senŝanca.
Mi mizere maĉas
ledojn por la ŝtopo
de l' malsata kropo,
de l' malsata kropo. (p.41)

Detala recenzo pri tiu kolektego da lirikoj – inter kiuj, tiom el la plej famaj poemoj de la mondo! – postulus mem dikan volumon. Eĉ notindas, ke *Tutmonda sonoro* ja ne estas kompleta. Kompreneble, amaso de Kalocsajaj tradukoj estas presita en diversaj reprezentaj kolektoj (*Hungara antologio, Petőfi, Heine, Baudelaire* k.a.), sed senkonsidere pri ili, mi vane serĉis en *Tutmonda sonoro* ekz-e kvin poemojn de Attila József, aperintajn en *Literatura mondo.* Ankaŭ aperis en *HV* poemoj de modernaj hungaraj aŭtoroj, kiuj ne estas ĉi tie represitaj. Oni komencas demandi sin, ĉu iam ni sukcesos kolekti absolute ĉion tradukitan de tiu ĉi majstro. Kaj oni staras mirgapante antaŭ la monumenta vivoverko postlasita de unu sola genia homo.

Ne povante ĉion trakti, mi turnas min fine – malgraŭ tio, ke „tradukojn oni faras por nescipovantoj de la originalo! " – al tiuj poemoj en *Tutmonda sonoro,* kiujn li tradukis el mia nacia lingvo, la angla. Lia elekto estas por anglalingvano interesa: Chaucer, Spenser, Shakespeare, Milton, Shelley, Keats, Poe, Tennyson, Browning. Pri ili mi elektas du atentindajojn. Unue, mi volas celebri du spirokaptajn tradukojn el Poe: ili estas majstrajoj. „La sonoriloj" estas pura onomatopeo, dependanta de vortmuziko kaj dense abundaj rimoj. En la originalo, la vorto *bells* (sonoriloj) estas unusilaba vorto kaj en la poemo mem reprezentas la sonon de la sonoriloj. Unuavide oni supozus tion netradukebla en Esperanton. Sed Kalocsay pli ol brile sukcesis (per *lang'*):

Aŭdu, sleda sonoril'!
Arĝent-tril'!
Ho, pri kia gaja mondo melodias ĉi babil'!
Tinte, tinte, tinte trilas
tra l' glacia nokt-obskur'!
Dum la steloj al ĝi brilas
okulume kaj jubilas
supre en kristal-plezur';
takte, takte, takte plu,
kiel en runa ritmo-flu',
ondas tiu tintetado el la trila, brila blank'
de l' arĝenta lang', lang', lang',
lang', lang', lang',
el la pinta, tikle tinta arĝent-lang'. (p.442)

La alia majstrajo estas „La korvo", kun ties internaj rimoj, kaj kies 18 strofoj ĉiuj finiĝas per la vorto *plu,* trudante la necesoп trovi 36-foje rimon al tiu vorto. Kalocsay mirindege rekreas la obsede mornan etoson de la poemo:

Foje, en la hor' noktmeza pri volumo stranga, peza
de scienc' forgesiĝinta mi meditis kun enu'.
Preskaŭ dorme, jam klinkape, jen, ekaŭdis mi, ke frape,
sur la ĉambropordo skrape, skrape sonas eta bru'.
„Vizitanto", mi murmuris, „sin anoncas per ĉi bru',
certe, jes, nenio plu." (p.445)

Mi estas konvinkita, ke Kalocsay, kiel ĉiuj poetoj, plej sukcesas kiam la kadro de la verko estas plej rigore strikta (kiel supre, aŭ kiel en, ni diru, „Aŭtuna kanto" de Verlaine), kaj malpli sukcesas, kiam li permesas lozigi al si la katenojn.

Pro tio (mia dua atentigo), mi profunde bedaŭras lian decidon longigi la versojn en „La aŭtuno" de Keats (aleksandroj) kaj en „Odo al la okcidenta vento" de Shelley (sepjamboj), ĉar tiuj tradukoj, laŭ mi, ne sukcesas. Sed por tion diskuti mankas loko ĉi tie.

Restas loko nur por esprimi profundan varman dankon al HEA pro tio, ke ĝi riĉigis nin per tiu ĉi volumo, samtempe omaĝante al sia genia samlandano.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: Vilmos **Benczik.** + Arta redaktoro: Judit **Somhegyi.** + Redakta komitato: Szilárd **Bálint,** Ada **Csiszár,** Márton **Fejes,** Ervin **Fenyvesi,** István **László,** Georgi **Mihalkov,** Péter András **Rados,** d-ro Zsuzsa **Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: Mihály **Gergely,** Ludoviko **Kőkény,** Alfonso **Pechan,** Aurel **Ponori-Thewrewk,** d-ro István **Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** + Respondeca eldonisto: Tibor **Vaskó.** Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,-, al eksterlando por unu jaro 90,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de Hungara Esperanto-Asocio. Budapest. Respondeca gvidanto: Tibor **Vaskó.**
Indexszám: 25 337 ISSN 0018–7704

UTOPIO

Ni citas el la baldaŭ recenzota poemaro de *Rejna de Jong* ŝian poemon: UTOPIO. *Kiam naskiĝos ŝtato Utopio,/ ĉielo tera, rev' de milionoj? / Nur post la mort' de ĉiu emocio; / – kazohinio-saĝaj lecionoj / pri la katenoj de la homa raso. // Szathmári pravas: nur kazoa homo, kiu funkcias laŭ la leĝ' racia / ...* – la lastajn tri versojn ni kaŝis en la ĉefliniojn (H.1., V.15.) de nia enigmo (ensendataj linioj).
Limdato: unu monato post la alveno de la revuo.

Horizontale: **15.** Gaja muzika verko (R) **16.** Ne tiun **17.** Foliaro (R) **18.** ...grafio: scienco pri popoloj **19.** Turnas sian spiriton al io **21.** Regula aranĝo **22.** Preciza tempo (R) **23.** Teologo de moskeo (R) **24.** Paŝis **26.** Senti minacon de danĝero (R) **27.** Loĝanto de Eŭropa lando **28.** Loĝejo por birdoj **30.** Fantazia bildo **31.** Helena dio de la ventoj (R) **32.** MO **34.** Literoj de la Unuiĝintaj Nacioj, miksate **35.** Prepozicio **36.** ... Angeles **37.** Prepozicio **39.** Idon de dombesto **42.** Interjekcio **43.** PF **45.** Kiel H.37 **46.** Produktaĵoŋ de vulkano **47.** Artikolo **48.** Numeralo **49.** Delikata agrabla odoro (R) **51.** Kiu tenas **53.** Direktu la ŝipon laŭ vento **55.** Juda preĝejo (R) **57.** Monato en pluraj lingvoj **59.** Naskito **60.** Faros **62.** Percepti odorojn (R) **63.** Interna **64.** Identaj vokaloj **65.** Identaj konsonantoj **66.** ..., kaj Julieta **68.** Sufikso por ago **70.** Prepozicio **71.** Konjunkcio **72.** Lilako **73.** RT **75.** Neĝkolora (R) **78.** Siberia river' **79.** Supernatura estaĵo (R) **80.** Kapvesto i.a. de pastroj, juĝistoj (R) **82.** Restantaj por ĉiuj ceteraj **84.** Finaĵo, farita per H.68 **86.** Centono de rublo **87.** Literatura verko, studo (R) **88.** Vorto de konsento **90.** Alta herbo en lagoj (R) **91.** Pli maljuna laŭ aĝo aŭ rango – ruse (STARŜIJ) **97.** Nigra kantbirdo (R) **98.** Duono de kvarono **100.** Brulegas **101.** Forpuŝi malpuraĵon

Vertikale: 2. Muzika intervalo de ok gradoj **3.** Bonmaniere afabla **4.** Grupo, amaso **5.** 600 – per Romiaj ciferoj **6.** Diablo (R) **7.** Bazan, nemalkomponeblan **8.** Vin kaj min **9.** Angulan distancon de la ekvatoro **10.** Membraro **11.** TF **12.** Valora metalo **13.** Ĉefa monumenta enirejo **14.** Malhelblua kolorilo **19.** Kor-inklino (R) **20.** Refleksiva pronomo **23.** Adverbo por nedifinita nombro **25.** Pronomon de V.20 **29.** Sentas bezonon trinki **33.** Numeralo **35.** Prepozicio **38.** Malfacile paŝanta pro kripleco **40.** Arta prezento personigo de ideoj **41.** Parto de filozofio, studanta problemojn pri la esto (R) **42.** Ĉambrego **44.** Malvarma **48.** Malrespekta ĉagreni iun (R) **50.** Frakcio **51.** Vira vesto de Romianoj (R) **52.** Sekvas post la sepa **54.** Sekvi ordonon (R) **56.** Aersimila materialo (R) **58.** Numeralo **61.** Enspiri fluaĵon en buŝon **62.** Mallarĝa laŭlonga truo **65.** Impresiĝi per organoj (R) **67.** Persona pronomo **69.** Febra infekta malsano (R) **71.** Metala kuirpoto kun tenilo (R) **74.** Ege plaĉa (du vortoj) **76.** La teksa ujo por ekz. greno **77.** Konjunkcio **80.** Konvena, taŭga (R) **81.** Startas **83.** Vorto de konsento **85.** Atenti, zorgi ion de ebla minaco **86.** Vira vento de renverse (R) **89.** Resti sur piedoj (R) **90.** Agrabla lipa tuŝo **93.** Reen: membro **95.** Vergo por sonigi kordan muzikilon (R) **96.** Persa monarĥo (R) **97.** Ina brusto (R) **99.** Sufikso montranta kolektivecon **101.** BA

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1981/4:
Ideo estas luno, kiu ĉion en silenta memoro ordigas;
Aforismo estas fulmo, kiu ĉion heligas.
Libropremion gajnis: *Jiří Patera,* Praha, CS; *Stanislaw Janusiewicz,* Zabrze, PL; *Františ*ek *Bárta,* Žilina, CS.



Leterkesto

Alfred Knapp, Bad Berka, GDR: Niaj legantoj amike komprenos, ke la redaktoroj – ne profesiaj! – simple ne havas sufiĉe da tempo por revizii la multope alvenantajn kaj ne petitajn manuskriptojn. Vi ĝentile elturniĝis antaŭ nia tre verŝajna (kvankam afable skribota) rifuzo pri publikigo, per prudenta rezigno pri tio. Tial ni faras ĉifoje escepton, kaj ne levas la forigantan sceptron Apolonan kontraŭ via poemeto! *Aŭtuno kaj maljuniĝo* vere paralelas en la homa konscio, sekve ankaŭ en multaj poemoj aperas la paroj de de tiuj komparoj preskaŭ senfine. La viaj – tute ne sonas malbone, nek maltrafe, kaj la memtruditan malfacilan rimskemon vi ofte lerte venkis. Tamen, tamen... tiu sessilaba formo, tro mallonga por tiu elegieca temo, rebatas, kaj sentigas breĉon inter enhavo kaj formo, tro bremsante la poezian manifestiĝon de la ideo. Kiel ajn estas, de amatora „rimulo" – via esprimo – tiu ĉi „Aŭtuno" estas konsiderebla kontentiga plenumo, rajte laŭdebla kaj aplaŭdebla en rondo de samideanoj. Almenaŭ tio estas nia modesta opinio, sincera pro via kritikopeto. *Cetere, restas plu valida* nia menciita starpunkto pri ne-kritikado de alvenantaj skribaĵoj. Ties reekspedadon (ankaŭ pro la kreskantaj poŝtaj tarifoj) oni ne atendu de la redakcio – kiu esperas tiurilate veran komprenemon de la estimata legantaro!

Hotta Hirohiko, Osaka, Japanio: Jen ni korektas pergazete: korespondi vi *ne* deziras, kaj via adreso pro eraro estis publikigita en nia tiucela rubriko... Ni devas bedaŭri, ke via adreso, kiun vi transdonis persone al Vilmos Benczik dum lia prelegveturo en Japanio, šajnis – simile al pluraj aliaj slipoj – korespond-deziro. Intertempe verŝajne jam trankviliĝis la korespondemuloj, al kiuj vi devis skribi kun tradicia ĝentileco la rifuzon (se eventuale viaj kolegoj ne transprenis tiujn adresojn.)

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

La aventuroj de Tom Sawyer de Mark Twain

Ĉu estas iu, kiu ne konas la aventurojn de Tom Sawyer? Eble en la infanaĝo preskaŭ ĉiu en sia gepatra lingvo legis tiun faman libron de Mark Twain. Sed tiuj, kiuj lernas Esperanton, nepre devas tralegi la bildromanon pri „La aventuroj de Tom Sawyer". Ili tiel perfektigos sian Esperanto-lingvoscion, kaj denove ĝuos la viglan humuron de la granda Usona verkisto.

1./ Kio estas la vera nomo de Mark Twain?
2./ Kiu mortigis la doktoron?
3./ Bonvolu daŭrigi la frazon:
„Estimata Tribunalo! Per la atestaĵoj sendube pruviĝis, ke..."

Limdato por la respondoj: unu monato post apero de tiu ĉi numero.

Ĝusta solvo de la demandoj en la n-ro 1981/2: 1. „Ĉiela birdo" estis verkita en 1916. -- 2. La edzo de Panni nomiĝas Komáromi. -- 3. Fraŭlo Miska diris: „Mia eta Panni... mia eta birdo... mia eta ĉiela birdo..."

Gajnis premion por la ĝustaj respondoj al la demandoj en la n-ro 1981/1: *Garam Melánia,* Pécs, H; *Kőszegi Jenő,* Dunaújváros, H; *Rajna Nenkova,* Pernik, BG. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Solvoj en la n-ro 1981/3: 1. La dialogo n-ro 17. -- 2. Pri Richard Burton kaj Brigitte Bardot temas en la dialogo n-ro 10. -- 3. Alekso havas 16 jarojn.

Libropremion gajnis: *Teodoro Lőwenkopf,* Maagan, Israelo; *A.S. Melnikov,* Rostov-Don, SU; *Krysztof Tomczyk,* Kielce, PL.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1981/4: 1. Asen Grigorov eldonis tri poemlibrojn: Garbo, Ruĝa Aŭroro kaj Gardu la pacon! -- 2. „En tia nokto..." -- 3. „Haĝi Dimitro".

Libropremion gajnis: F-ino *Dora Ilieva,* Sofio, BG; f-ino *Molnár Erika,* Budapeŝto, H.

Korespondi deziras

Inĝ. *Belski* Vladimir (47) pri seriozaj temoj, *Belovo* Prĵevalskogo 16, SU–652622. -- S-ino Anna *Jürgenson* (34) vendistino, pri pm, bk, turismo. *Tallin* Kuldnoka 7-42, SU-Estonio, 200 006. -- Arvi *Seeba* (35) laboristo, pri filatelio, bk, poŝkalendaroj, bildkovertoj, *Tartu* Marja 24-7, Estonio, SU-202 400. -- F-ino Iris Betzaida *Aranguren* int. pri sportoj, dancoj, *Caracas* Megalles Catia, Calle Ucrania 41, Venezuela 1030. -- S-ro Alfredo C. *Portillo* int. pri sportoj, tabloteniso, Av. Andrés Bello. Ed Catleya (Ultramar Express) *Caracas* 1050, Venezuela. -- S-ro Stojĉo *Botev* (35) ktm, prec. kun hungaroj, eblas rec. gastado, *Gabrovo* str. Negenska 1, BG-5301. -- F-ino Laima *Salne* (20) pri naturo, landoj, popoloj, kol. bk pri bestoj, *Ligatne* Césu raj. Gaujas 12a-7, Latvio, SU-228510. -- S-ro Ilmars *Briŝka* (30) pĉt, pri vivkutimoj, E-movado, kol. bk, pm, *Liepaja* Ziemelu 57b, Latvio, SU-229700. -- S-ro Ihor *Puŝkar* (23) pedagogo, pri E-instruado, junulara agado, k.a., ktm, *Ternopol* Lesi Ukrainki 33-77, SU-282 013.

S-ro *Virág* Miklós (23) pri okultismo, spiritismo, religio kun hindiaj kaj Azianoj, *Subotica,* Iv. Milankovica 29b Jugoslavio, YU-24000. -- S-ino *Galinienė* Ruta (22) dentoteĥnikistino, pri div. temoj ktm, *Saldutiŝkis,* Litovio, SU-234 900. -- F-ino Pille *Korn* (17) faklernantino, pri karateo, filatelo, filumenio, *Tallinn* Parnade pst. 28A, Estonio, SU-200 009. -- S-ro Sergej *Nikonov* mineja savisto, pĉt, *Kohtla-Järve* pk. 34, Estonio, SU-202020. -- S-ro Rumen *Gadjev* (28) ktm, ankaŭ rec. gastado, *Gabrovo* str. Sedjankova Livada 20. BG-5300. -- *Gailuma* Vija (22) instruistino, ktm, pri div. temoj, kol. poŝkalendaretojn. *Liepaja* str. Brivibas 17-7. Latvio, SU-229700. -- F-ino Maritza Y. *Sánchez,* pri ĝardenistiko, Av. Lecuna, Res. M. Piso 2, apt. 21. *Caracas* 1010, Venezuelo. -- S-ro Rafael E. *Garcia* pri atletismo, *Caracas,* Calle 9, no. 9. -- S-ro Adolf R. *Lejter* ktm, pĉt, urbo *Hristinovka* str. Kalinin 60, kv. 13, Ukrainio, SU-258 800. -- Gelernantoj 11-13 jaraj, de E-klasoj, Estonio, *Tallinn;* lernejoj 10. Keskkool, SU-200 026 -- kaj 44. Keskkool, SU-200 029. -- F-ino Indra *Davidáne* (18) pri literaturo, landoj, popoloj, kol. bk, pm, kalendaretoj, *Nereta* Raina 1-3. Latvio, SU-229 381. -- Geofizikisto Vasilij Iv. *Gufenko* (35) kun filatelistoj. *Neftejugansk* (Tjumena obl.) 9 MKR 1, kv. 55. SU-626 430.

Leterkesto

Hermann Schmid, Augsburg, GFR: Ni povas kolegiece konsenti kun via kapgratado, kion ofte kaŭzas leteroj, trafantaj vian redakcion en Bavario. Ankaŭ ni devas cerbumi, ne malofte, ĉu la subskribinto – kun tute nekonata personnomo – estus *ino aŭ malino?* Alifoje, ĉu ene de la longega adreso, kiu vorto anoncas la urbon aŭ vilaĝon apud lia regiono, kvartalo kaj subkvartalo? En la nuna epoko de poŝtaj kodoj, por la poŝta distribuado ne estas necesa longa precizigo de adreso, eĉ se temas pri fora domo sur montdeklivo, des malpli en urbo. Al viaj konsternaj ekzemploj ankaŭ ni povas aldoni kelkajn, ĉar troviĝas korespondemuloj tra la mondo, kiuj ŝajne por baldaŭa vizito, kaj ne por akceptindaj leteroj donas sian adreson. Ili tro detale emas indiki, kiamaniere „estas trovebla" la loĝejo, kvazaŭ la leterportisto devus ĉe ĉiu stratangulo demandi la direkton... Por esti pli afabla al la respondonto, oni povas kaj rajtas ja iomete *mallongigi* eĉ la oficialajn nomojn: anstataŭ „avenuo de Ludoviko Lazaro Zamennof, distrikto Stelo, Verd-urbo 16", pli taŭgas: „av. L.L. Zamenhof, Verd-urbo", la kodo ekz. 216-05, klare montras al la poŝtisto kaj la kvartalon 16, kaj la rajonon Stelo, do estas superflua plilongigo indiki ilin en poŝta adreso! Kara kolego, ni opinias, ke niaj organoj devas eduki ankaŭ je konvenaj internaciecaj kondutoj kaj kutimoj, nia bonintenca legantaro certe volonte akceptos tion. La landaj, lokaj bultenoj povus prezenti bonvenan helpon al siaj legantoj per tiucelaj, simplaj informoj kaj instrukcioj, ĉar en la interkomunikado de internacia movado, kiel la nia, jen redakciojn, jen organizantojn de renkontoj, de libroservoj k.a. multe ĝenas kaj superflue ŝarĝas la nekonoj de taŭgaj kutimoj, flanke de ankoraŭ nealkutimiĝintaj samideanoj. Dankon ankaŭ pro via bona humuro!

Ivan Kulakov, Voroneĵ, SU: La senditan artikolon el „Neues Leben" kun via E-a traduko pri la bela monumento en Omsk – ni transdonis al koncerna historia muzeo-arhivo. Károly *Ligeti,* la fama hungara internaciisto-revoluciulo estas konata en Hungarlando, kaj oni varme dankas vin pro informoj pri la monumento, kiu inde memorigas pri lia heroa morto; lin murdis kontraŭrevoluciaj gvardianoj en Omsk en 1919.

ORION
TV
RADIO

SONO-FIDELO DE SUPERA GRADO ORION HI-FI TURO

nova

hi-fi

STEREO





- HI-FI STEREO GRAMOFONO
- HI-FI STEREO AM/FM TUNER
- HI-FI STEREO-LAŬTIGILO
- HI-FI STEREO KASETA MAGNETOFONO
- KASEDUJO
- DISKUJO

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumtourist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.